


EL POPOLA ĈINIO

中國報道

9 1983





Bele vestita novedzino

Nupto de la taĝikoj



Bonvolu legi la artikolon "Taĝikoj
sur Altebenajo" en tiu ĉi numero.

Fotoj de LAO BAI kaj HAI FENG

La novgeedzoj interŝanĝas fingroringojn.



Laŭ la nacia moro oni ŝutas iom da faruno sur la kapojn de la novgeedzoj, kio simbolas feliĉon dum la tuta vivo.



Rigardo al la novedzino

Parencoj gratulas la novan paron.





Konkurso pri kaptado de ŝafo estas aktivado ŝatata de la taĝikoj en la tago de geedziĝo.



Por festi geedziĝon

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (GUOJI SHUDIAN) P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

SUR LA KOVRILO:

Ĉina sportisto Zhu Jianhua, kiu rompis la mondan rekordon de altsalto

de LIU DINGCHUAN

SUR LA DORSKOVRILO:

Prospereco

de REN SHIYIN

KOLORAJ SERIOJ:

Nupto de la taĝikoj
Pejzaĝoj de Longzhou
Fotoj faritaj de esp-istoj
Ĉinaj pladoj
Fluso de Qiantang-rivero
Hunan-aj brodaĵoj

NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

Ĉinaj kuracistoj eksterlande
La Berlina Kordinstrumenta Kvarteto en Pekino
La Pantomima Trupo de Ladislav Fialka en Ĉinio

Enhavo

Grava kunveno por la ĉina popolo	3
Rekte, kuraĝe kaj ne flankigante	2
Mi kaj "El Popola Ĉinio"	4
Pri la naturo de Esperanto	6
POR KOMENCANTOJ: Du ĉinaj antikvaj rakontetoj	9
UEA estas 75-jara	10
ESP-NOVAĴOJ	11
Ekster tribunalo	13
Kiel mi solvis iliajn konfliktojn?	15
Kiel Ĉinio utiligas eksterajn kapitalojn kaj teknikojn	21
La mirinda Hunan-a brodaĵo	50
Zhu Jianhua kreis novan mondan rekordon en altsalto	24
Ĉinaj kuracistoj eksterlande	19
20 sanprotektaj ekzercoj (2)	29
Pu Songling kaj lia "Notoj pri Strangaĵoj de Liaŭĝaj"	32
Qingfeng (Klasika Novelo)	34
MIA VIVO: Mi ĉiam estas ĝoja	38
VIDINDAJ LOKOJ: Longzhou — Perlo ĉe la suda landlimo	26
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Evoluo de la ĉina mono	40
EN LA REGIONOJ DE NACIMALPLIMULTOJ: Taĝikoj sur altebenaĵo	43
5 000 JAROJ DE ĈINIO: Sui-dinastio unuigis Ĉinion	45
TRA LA MONDO	48
ĈINAJ PLADOJ	27
KURANTAJ AFEROJ	37
KORESPONDI DEZIRAS	17

JARABONTARIFO	Belgio	BF	180.00	Finnlando	FMK	24.00	Italio	Lit	5200	Nederlando	Gld.	12.60	Portugalio	Esc	400		
Aŭstralio	\$A	5.70	FR Germanio	DM	10.80	Francio	FF	26.00	Japanio	Yen	1400	Nov-Zelando	NZ\$	6.70	Usono	US\$	6.00
Aŭstrio	Sch	80.00	Britio	£	3.00	Hispanio	Pts	600	Jugoslavio	Din.	180	Svisio	SF	10.00	Kanado	Can\$	7.20

Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko: £ 2.20 US\$ 4.30

Por aliaj landoj en Eŭropo: £ 3.00 US\$ 6.00

Rekte, kuraĝe

kaj ne flankiĝante

JEN prezentiĝas al vi, karaj amikoj kaj legantoj, la 300-a numero de El Popola Cino, nia komuna gazeto, kiel multaj legantoj ĝin nomas kun amo. Ĉina proverbo diras: Ne estas oro pure-pura, nek estas homo senmakula. Ja ankaŭ nia gazeto ne povas esti perfekta. Ni tamen gojas, ke en la lastaj jaroj pli kaj pli multaj legantoj skribis al ni kuraĝigajn laŭdojn pri la bonvenaj ŝanĝoj al la gazeto, efektiviĝitaj dank' al kunaj klopodoj de la redakcio, la kunlaborantoj en diversaj landoj kaj helpoj de niaj fervoraj legantoj.

Pasis jam preskaŭ triona jarcento post la apero de la unua numero de nia revuo en majo 1950. Kun bedaŭro ni vidas, ke unu el ĝiaj fondintoj, nia kara Venlo Fon, kaj kelkaj plej fruaj kunlaborantoj eksterlandaj jam forpasis, kaj iuj grandaĝaj flegantoj de ĝi jam devis forlasi la vicaron de laborantoj. Sed tamen EPC, la zorge flegita planto daŭre kreskas kaj anstataŭ velki,

fariĝas ĉiam pli bela kaj prospera, ĉar al la vicaro de ĝardenistoj aliĝis novaj daŭrigantoj de la laboro kaj lertiĝas lernante en la praktikado. Ni eĉ povas atendi de nia planto ĉarmajn florojn kaj dolĉajn fruktojn por ĉiuj sinceraj dezirantoj de amikeco kaj paco.

Ni estas optimistoj, sed ne blindaj antaŭ la malfaciloj, kiujn alvizaĝas nia komuna afero de la internacia lingvo, la interpopola amikeco kaj la mondpaco. Ni scias, ke nia voĉo estas ankoraŭ ne laŭta nek elokventa por bone mobilizi la verdajn pacbatalantojn por pli energia strebado al nia komuna celo. Sed ni firme fidas la fortan fluson de la historio kaj la fortan volon de la popolo al interkompreno, amikeco kaj paco. Ni kredas, ke certe venkos la nobla ideo de internacia helpa lingvo kaj sukcesos la strebado al amikeco kaj paco tutmonda. Kaj ni kuraĝe marŝos antaŭen.

Se ni komparus la 300 aperintajn numerojn de EPC kun paŝoj

al nia nobla celo, ni konstatas je retrorigardo, ke iuj el niaj paŝoj estis faritaj rekte antaŭen, aliaj iom flanken kaj iuj misdirekten. Ni klare vidas, ke por plibonigi la gazeton ne sufiĉas nura klopodado de la laborantoj en la redakcio, ja tre gravas ankaŭ la kunhelpo kaj kunlaboro de niaj amikoj kaj legantoj. Ankaŭ la historio de EPC pruvis, ke vere populara gazeto povas estiĝi nur dank' al kunagado de la redakcio, la distribuantoj kaj la legantaro. Por ke la farotaj paŝoj direktiĝu rekte al la celo, ke niaj estontaj klopodoj estu pli utilaj al nia komuna afero, ni sincere petas niajn amikojn kaj legantojn, ke vi ne ŝparu al ni viajn admonojn, konsilojn kaj proponojn.

300 paŝojn ni faris, sed ankoraŭ longa vojo nin atendas. Ni sincere antaŭdankas ĉiujn niajn kunhelpantojn kaj kunlaborantojn, kiuj marŝos kune kun ni "rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante" al la nobla celo.

La Red.

Grava kunveno por la ĉina popolo

LA Unua Sesio de la Sesa Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko okazis en Pekino de la 6-a ĝis la 21-a de junio ĉi-jare.

Ĝin ĉeestis pli ol 2 900 reprezentantoj el diversaj lokoj kaj nacioj de Ĉinio. Inter ili estis laboristoj, kamparanoj, ŝtatoficistoj, armeanoj kaj intelektuloj, kaj ankaŭ reprezentantoj el diversaj demokratiaj partioj kaj popolaj societoj kaj tiuj de la senpartiuuloj, samlandanoj el Hongkong kaj Aŭmen kaj elmigrintaj ĉinoj. La nove elektitaj reprezentantoj konsistigis 76.5% de la tuta kongresanaro.

En la sesio la reprezentantoj diskutis pri la “Raporto pri la Laboro de la Registaro” farita de Zhao Ziyang, la ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, sankciis la “Ŝtatan Finan Kalkulon

en 1982” kaj la “Planon de Nacia Ekonomio kaj Socia Disvolvigo por 1983”.

En sia raporto Zhao Ziyang montris la grandajn sukcesojn atingitajn en la pasintaj kvin jaroj en efektivigo kaj disvolvo de politika situacio de stabileco kaj unuiĝo, plifortigo de la socialisma demokratio kaj leĝa sistemo kaj disvolvo de la nacia ekonomio. Li diris, ke la totala produktovaloru de industrio kaj agrikulturo kreskis meznombre 7.3% ĉiujare, la agrikulturo sin liberigis de longa stagnado kaj sin turnis al senĉesa disvolviĝo. La urbaj kaj kamparaj merkatoj ĝuis prosperecon malofte viditan post la fondiĝo de la nova Ĉinio; la ekonomiaj kaj teknikaj interŝanĝoj kun fremdaj landoj multe disvolviĝis; la reformado de la ekonomia sistemo

ricevis rimarkindan efikon; la eduka, kultura kaj scienca afero havis novan disvolviĝon; kaj la popola vivo okulfrape pliboniĝis.

Parolante pri la taskoj en la venontaj kvin jaroj, Zhao Ziyang emfazis, ke oni devas plifortigi konstruadon pri energio kaj trafiko, aktive fari teknikan reformadon al la ekzistantaj entreprenoj kaj atenti pri ekspluatado de intelekto. Li diris, ke en la venontaj kvin jaroj la totala nombro de la gejunuloj akceptotaj de la altaj lernejoj kreskos de 315 000 al 550 000; samtempe oni disvolvos altan edukon per disaŭdigo, televido kaj korespondado, kaj ankaŭ laŭplane kondukos profesie teknikan edukon por ke la totala nombro de la lernantoj, kiuj lernos en la profesie teknikaj supe-

Hu Yaobang, Deng Xiaoping, Li Xiannian, Zhao Ziyang, Deng Yingchao kaj Peng Zhen (de maldekstre) en la ripozejo dum la Unua Sesio de la Sesa Tutlanda Popola Kongreso



raj mezlernejoj, konsistigu pli ol 40% de tiu de la lernantoj de la superaj mezlernejoj. Ĉefministro Zhao Ziyang diris ankaŭ, ke oni devas daŭre plifortigi konstruadon de la socialisma demokratio kaj leĝa sistemo kaj ĉiamaniere elimini diversajn fenomenojn pri malobservado de leĝoj kaj disciplinoj en la socia vivo por deradike ŝanĝi la socialan spiritan fizionomion.

Dum la sesio la reprezentantoj per balotado elektis eksgeneralon Li Xiannian, kiu longe funkciis kiel vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, kiel prezidanton de la Ĉina Popola Respubliko, Peng Zhen, kiu estis urbestro de Pekino kaj longe funkciis kiel vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso, kiel ĝian prezidanton, Deng Xiaoping, fame konatan strategiiston kaj politikiston, kiu havis gravajn oficojn en la Partio, registaro kaj armeo dum longa tempo, kiel la prezidanton de la Centra Milita Komisiono de la Ĉina Popola Respubliko. Laŭ la propono de la prezidanto de la Ĉina Popola Respubliko, la sesio nomumis Zhao Ziyang ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro.

Dum la sesio okazis en Pekino ankaŭ la Unua Sesio de la Sesa Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco. ĈPPIK estas patriota unuecfrota organizo de Ĉinio. Ĝiaj membroj estas famuloj kaj specialistoj de diversaj rondoj, kiuj ludas rolon de konsilanto kaj saĝa proponanto en la ŝtata vivo. La sesio elektis Deng Yingchao kiel la prezidanton de la Tutlanda Komitato de ĈPPIK. Ŝi estas la edzino de la forpasinta ĉefministro Ĝou Enlaj, kaj politikistino, kiu ĝuas altan prestiĝon.

PANDISO*:

Mi kaj "El

Popola Ĉinio"

SEPTEMBRE de 1983, "El Popola Ĉinio", la organo de la Ĉina Esperanto-Ligo, jam eldonis sian 300-an numeron. Nun ĝi estas belaspekta, enhavo-riĉa kaj multe ilustrita Esperanta gazeto kun pli ol 70 paĝoj, el kiuj pluraj estas koloraj. Laŭ la opinio de eksterlandaj esperantistoj, ĝi estas unu el la plej elstaraj periodaĵoj en la tuta Esperantujo. Ĉu la hodiaŭaj legantoj scias, kiel ĝi aspektis, kiam ĝi debutis en majo 1950, nur sep monatojn post la fondiĝo de la nova Ĉinio?

Tiutempe ankoraŭ ne fondiĝis la tutlanda organizo de la ĉinaj esperantistoj. En la fino de 1949, kiam mi estis instruisto de la angla lingvo en iu mezlernejo en Ŝanhajo, k-do Tikos, respondeculo de la ĵus refondita Ŝanhaja Esperantista Ligo, skribis al mi, ke niaj samideanoj en Pekino planas eldoni Esperantan bultenon por liveri novaĵojn de la nova Ĉinio al la eksterlandaj esperantistoj, kaj esperis, ke mi kunlaboros kun ili. Anticipante

mian eblecon por regule servi al mia patrujo per mia ŝatata Esperanto, mi senhezite akceptis la proponon. Post nelonge oni sendis al mi la artikolon "Almozulo Fariĝas Distriktestro", kiun mi tradukis Esperanten kaj sendis al Pekino. Ĝi aperis en la unua numero de EPC. Post tio ĝia redakcio sendis al mi 1-3 tradukotajn artikolojn ĉiumonate, ĉar tiam troviĝis malmulte da laborantoj en la redakcio.


La bulteno estis redaktata kaj eldonata en la kadro de la Fremdlingva Eldonejo. Ĝi estis modesta, okpaĝa, senkovrila informilo kun simplaj ilustraĵoj, presita sur neluksa ĵurnala papero en oktava formato. Ĉar la bulteno informis per la Internacia Lingvo al la esperantistoj tra la tuta mondo pri ĉio en la nova Ĉinio, kio estis de ili tute nekonata, EPC estis varme aplaŭdata de diverslandaj samideanoj. Ĝis la fino de 1951 jam fariĝis ĝiaj perantoj 26 individuoj kaj Esperanto-organizoj el 20 landoj.

Dank' al la subteno de la pac-amaj kaj progresemaj samideanoj tutmondaj, EPC komencis eldoniĝi de la jaro 1952 en pli ampleksaj kajeroj (24 paĝoj, 19×26 cm.). Sin trovis bildkovriloj kaj pli da ilustraĵoj. Mi elĉinigris plejparte artikolojn pri la konstruado de nia lando, antikvaj artaĵoj, ktp.

EPC ĉesis eldoniĝi en januaro 1954 kaj reaperis en decembro 1957. Ekde tiam la Ĉina Esperanto-Ligo transprenis la respondecon pri la reeldonado de EPC, sed ĝi aperis ĉiun duan monaton, por ke ĝi estu pli ampleksa kaj povu enhavi pli malpli longajn literaturaĵojn. De tiam la kovriloj estis koloraj kaj la nombro de la paĝoj kreskis al 32. Ekde la jaro 1963 aldoniĝis 4 paĝoj kun koloraj bildoj.

Post la ĵusa reapero EPC havis nur dek laborantojn, mi denove fariĝis ĝia kunlaboranto, tradukante plejparte literaturaĵojn, inter kiuj kelkaj estis klasikaj, ekzemple: "Gingjang-monteĝo" kaj "Kion Diras la Serpent-Kaptisto". Kiel konstanta kunlaboranto, mi estis sufiĉe bone taksata pro la rapideco de mia tradukado. Malgraŭ ke mi loĝis en Ŝanhajo, urbo situanta tre malproksime de Pekino, oni ĝenerale sendis al mi urĝe bezonatajn tradukaĵojn kaj mi ĉiam ĝustatempe plenumis la laboron.

De aŭgusto 1963, mi transposteniĝis al la Ŝanhaja Normala Kolegio kiel instruisto de la angla lingvo kaj de majo 1964 al la Orient-ĉinia Normala Universitato kiel instruisto de la angla lingvo kaj Esperanto. Bedaŭrinde en somero de 1966 komenciĝis la dekjara kultura revolucio kaj la kontakto inter la redakcio de EPC kaj mi interrompiĝis. Mi ne scias, de kiam la revuo



La aŭtoro

denove eldoniĝis ĉiumonate. Post tiu mondkonata katastrofo mi apenaŭ laboris por EPC. La kaŭzoj estas du: 1-e, pro tio ke mezaĝaj kompetentaj esperantistoj estas elbakitaj, ĉiuj artikoloj de la revuo povas esti tradukitaj de ili mem en la sidejo de la redakcio en nia ĉefurbo; 2-e, estante grandaĝulo kaj suferanto de alta sangpremo, mi ĉiam ne povas cerbumi tro longe. De mia rekontaktiĝo kun EPC, mi verkis nur du artikolojn. Unu el ili titoliĝas "Mi kaj Esperanto". Tiun mian aŭtobiografieton esperantistan la kurs-gvidanta profesoro d-ro James Cool de San-Franciska Ŝtata Universitato en Usono, en la Someraj Sesioj de 1982, utiligis kiel suplementan legajon por siaj kursanoj. Pri tio mi sciigis de s-ino Ĉien Mingĉi, mia helpantino de Esperanto, kiu estas perfektiganta sian anglan lingvon en tiu universitato kaj partoprenis en la Someraj Sesioj de Esperanto pasintjare.

Retrorigardante mian pasintan kunlaboradon kun EPC, mi volas kalkuli, kiom da artikoloj mi efektive elĉinigris por ĝi. Nu, en la unua periodo (de majo de

1950 ĝis decembro de 1953), kiam ĝi aperis monate, mi tradukis pli ol 50 pecojn, dum en la dua periodo (de la fino de 1957 ĝis la somero de 1966), kiam ĝi estis dumonata gazeto, 50 pecojn, kiuj estis pli malpli longaj literaturaĵoj. Mi esperantigis entute pli ol 100 artikolojn, ne enkalkulante tiujn en libroforma eldono.

Kvankam nuntempe mi ne povas multe labori por EPC, tamen kiel ĝia fidela kunlaboranto dum longa tempo, mi estas senlime ĝoja, kiam mi vidas, ke ĝi rapide kreskas kaj ĝuas ĉiam pli altan prestiĝon inter la esperantistaro tutmonda.

** La aŭtoro estas vicprofesoro de la Orient-ĉinia Normala Universitato.*



Pri la naturo de Esperanto

D-RO Panel flanke aludas alian ŝajnan malfacilaĵon de Esperanto, kiu turmentas multajn afablajn lernantojn, kaj ankaŭ ĝi, laŭ mia opinio, devenis origine de la kutimoj de eŭropaj lingvoj kaj la difinado per tradukoj, nome la “verboj transiraj aŭ netransiraj” (aŭ kiel ni nuntempe diras: transitivaj kaj netransitivaj). Ĉiu scias, ke tiu koncepto ŝajnas al multaj lernantoj kaj eĉ spertuloj eterne mistera kaj miskompreniga. Mi klopodos montri, ke tiu malfacileco devenas de nacilingva pensmaniero, al kiu Esperanto logike ne konformiĝas.

Kiam vortaristo asertas, ke la radikoj *dron* estas ekvivalento de la angla vorto *drown*, li faras pli ol nur supozigi, ke *dron* estas verba; li ankaŭ pensigas, ke *dron* havas du tute malsamajn signifojn, ĉar la angloj uzas unu vorton *drown* por esprimi du komplete malsamajn konceptojn, nome: *drown* kaj *cause to drown* (t.e. *droni* kaj *dronigi*). Sed la radikoj *dron*, laŭ la fundamenta koncepto pri la lingvo, fakte esprimas nur unu ideon, t.e. *sufokiĝi en akvo*. Nia supozita denaska esperantista unulingvulo neniam pensus pri transitiveco aŭ netransitiveco: en lia kapo ekzistus nur ideo pri homo aŭ hundido baraktanta subakve kaj mortanta pro spiomanko. Se enirus la bildon alia persono, kiu tenus la dronanton subakve, li sciis aŭtomate, ke tiu alia persono *igas lin/ĝin droni*. Nur

la nacilingvaj kutimoj trudas al ni tiun malfacilaĵon, kaj Esperanto ankaŭ tiurilate ne similas al la eŭropaj lingvoj. Transitiveco kaj netransitiveco estas konceptoj vere nenecesaj en pura Esperanto. Se ni ĝuste komprenas la semantikan enhavon de ĉiu radikoj, ankaŭ ni mem ne plu havos malfacilaĵojn pri *-ig* kaj *-iĝ*. Principe ĉiu elemento en nia lingvo devus havi nur unu konstantan signifon. Bedaŭrinde, dum la evoluo de la lingvo tiu principo jam tro ofte modifiĝis — ankaŭ pro la nacilingva influo. Pensu ekzemple pri la radikoj *firm*. Neniam estis necesa, ke komerca entrepreno en Esperanto estu *firma* (kun *firma*, *firme*, *firmulo* ktp kiel latentaj formoj), sed la influo de la angla tro forte efikis. Supozeble tiu tendenco ne detruos nian lingvon — vivanta lingvo ĉiam emas proprigi al si fremdajn vortojn — sed ŝajnas al mi, ke ni devus tamen konscii, kion ni faras, kaj laŭeble elekti iom prudente niajn novajn terminojn.

Dum ni diskutas gramatikan karakteron de la radikoj, ni pripensu iomete ankaŭ aliajn vortkategoriojn. Ekzemple, prepozicioj. Ĉu prepozicio fakte estas prepozicio? Aŭ ĉu ĝi estas, eble, radikoj kiu rolas prepozicie? Almenaŭ tio estas certa, ke la prepozicioj rolas radike! Senĝene ni parolas pri la *transa* flanko de la strato, pri niaj *antaŭuloj* kaj *anstataŭuloj* en la *ĉirkaŭaĵo*. ni *peras* aŭ *agas senpere*, ni *kon-*

traŭas la malbonon, ktp, ktp. Tute klare ni uzas ĉiujn prepoziciojn kvazaŭ ili estus radikoj kiam la semantiko de la prepozicio tion proponas al ni. Dum rolas indiferece kiel prepozicio kaj konjunkcio, kaj ankaŭ kiel radikoj: *dume*, *duma*. Kaj se prepozicioj rolas radike, kial ne inverse: radikoj rolu kiel prepozicio? El tiu pensmaniero devenas la prepozicia uzado de *far*, kiel en *akcepto de Esperanto far la publiko*, aŭ *traduko de “Reĝo Lear” de Ŝekspiro far Kalocsay*. Al multaj esperantistoj tiu jam tutmonde uzata formo ne plaĉas; sed ĉu ĝi ne estas implicita jam en la lingvo mem, kaj preferindas al eventuala enkonduko de nova vorto, kiel ekzemple *di*, por iel solvi la problemon de tro multsignifa *de*?

Prepozicioj eĉ ne ekzistas en iuj lingvoj: eĉ en klasika latino ili estis tre maloftaj; kaj oni uzas aliajn rimedojn, ekzemple finajojn, por esprimi la koncernan rilaton inter la ideoj. Ankaŭ Esperanto posedas kaj utiligas aliajn rimedojn paralele kun prepoziciaj frazoj. Prepoziciaj frazoj fakte rolas adverbe aŭ adjektive: *li sidis sur fotelo* = *li sidis fotele*; *la viro kun ruĝa nazo* = *la viro ruĝnaza*. La adjektiva alternativo ofte ekzistas ankaŭ en hindeŭropaj lingvoj, sed la adverba alternativo estas io aparta. Zamenhof mem uzis adverbojn en funkcio *kompara*: *bona famo sin trenas testude* (= kiel testudo); *mensogas*

maŝine (= kiel maŝino); sed la adverba alternativo por frazoj prepoziciaj definitive radikiĝis en Esperanto nur kiam sentiĝis la influo de niaj grandaj verkistoj hungaraj. Laŭdire io simila estas karakterizo de la hungara lingvo — kaj la hungara, kompreneble, estas lingvo nehindeŭropa. Sen la influo de lingvo nehindeŭropa, ĉu Esperanto hodiaŭ fakte disponus pri tiu rimedo fleksebla kaj esprimiva?

Supozeble neniu surpriziĝos, mi nun transiras — por kompletigi mian tezon — al alia elemento en vortfarado, nome la afiksoj. Kompreneble ankaŭ ili rolas ankaŭ radike. Zamenhof parolis pri esenco *mala*, ktp. Sed ĉiuj afiksoj senĝene rolas radike pro sia preciza semantika enhavo: *ega, eteco, ajo, inda, aliĝilo, umadi*, ktp. Ankaŭ ŝajne sendependaj vortoj kiel *jes* kaj *ne* kunludas: oni jesas kaj neas; kaj la korelativoj: la tago de Sankta Neniamo, la diversaj kialoj, ĉiesulinoj, la iamo longe for, nenionfarado, ktp. Eĉ la finaĵoj havas ekspluateblan semantikon: Grabowski konstatis, ke *la belo* estas *l'o bela*, la poeto Miĥalski skribis pri io, ke ĝi estis *neniam kaj ĉiam as'anta*.

Kaj do ni estas devigataj demandi, ĉu niaj netaj kategorioj estas esencaj aŭ nur oportunaj? Oportunaj ili kompreneble estas, kiam oni instruas la lingvon je nivelo elementa. Almenaŭ en Eŭropo oni pli facile ekkomprenas la lingvan strukturon sub tiu formo, kaj mi certe ne volas malhelpi tion. Sed la vere alloga demando restas: ĉu la naturo de Esperanto kiel sendependa fenomeno ne estas io aparta, speciala — kaj eble unika? Ĉu ni eble tro strikte ligis nian uzadon de la lingvo pro subkonsciaj

antaŭjuĝoj? Kaj plej grave: ĉu ni eble ankaŭ hodiaŭ ankoraŭ tro klopodas plieŭropigi nian lingvon anstataŭ ĝisfunde esplori ĝiajn proprajn latentojn?

La plej serioza malutilo, laŭ mia opinio, kiun superflue trudas la hindeŭropeco al nia sinteno pri nia lingvo, koncernas la verbojn. Neniu verbo en la mondo (verŝajne) estas pli simpla, kaj pli facile kaj rapide lernebla, ol la formo, kiun Zamenhof elpensis por Esperanto. La esperanta verbo havas nur kaj precize ses finaĵojn: *-is, -as, -os, -us, -u, -i*. Sed la hindeŭropaj verboj estas treege komplikaj. Tio havas kiel avantaĝon, kompreneble, ke pere de la hindeŭropa verbo oni povas sin esprimi treege precize kaj treege subtile — sed notindas, ke la grandega plimulto el eĉ indiĝenaj parolantoj de ekzemple la angla kaj franca grandparte ignoras tiujn eblecojn kaj sin limigas al la plej simplaj formoj; la komplikaj formoj estas tereno preskaŭ ekskluzive de kelkaj kleruloj. Neindiĝenoj studas tiujn lingvojn dum multaj jaroj kaj neniam sukcesas regi la verbajn komplikajojn. Sed la esperantan verbon ĉiu povas mastri tre rapide; verŝajne nur *-u* starigas kelkajn malfacilaĵojn. Tamen tiu simpleco ne sufiĉis al la verkistoj de niaj lernolibroj, kiam ili celis instrui Esperanton pere de nacia lingvo, kaj por egaligi kaj tabeligi Esperanton al la nacilingvaj formoj ili elpensis ion, kion ili nomis *kunmetitaj verbformoj*. Tion farinte, ili sukcese senkuraĝigis kaj forpelis de la lingvo senombrajn milojn da lernantoj, kiuj trovis tiujn formojn tre malfacilaj. Kaj la tuto estis fantaziaĵo. Kunmetitaj verbformoj en Esperanto ne ekzistas.

Kio ekzistas, tio estas la verbo *est*-kun adjektivo. Pri la fakto, ke de tempo al tempo tio plej oportune tradukiĝas en alian lingvon pere de komplikita verbo, ne kulpas Esperanto. La Esperanto mem estas treege simpla. Se vi ne kredas, prenu bonan originalan tekston de Baghy, aŭ Forge, aŭ Zamenhof mem, kaj traduku ĝin en hindeŭropan lingvon.

Kiam oni uzas *est*-kun adjektivo havanta partecipantan afikson, tiu adjektivo restas adjektivo kaj, kiel ĉiuj adjektivoj, priskribas la staton de la substantivo (do subjekto) en la momento priskribata. Se ni diras, ke *la lago estas trankvila*, ni priskribas la staton de la lago en la nuna momento, kaj same se ni diras, ke *la lago estas forlasita* aŭ *malgrandiĝanta* aŭ *sondata*; la sola verbo estas *estas*, kaj la adjektivo priskribas la aktualan staton de la subjekto. Se ni diras, ke *la profesoro estos veninta post kelkaj horoj*, tio ne diferencas strukture de *la profesoro estos malsata post kelkaj horoj*: eble la teorie verba karaktero de la radiko *ven* supozigas, ke *veninta* estas iel verba, sed ĝi ne estas. Ĝi estas adjektivo priskribanta la staton, en kiu la profesoro sin trovos post kelkaj horoj.

La tuta furioza diskutado pri *ata/ita*, kiu bruegis en la movado antaŭ dudek jaroj, baziĝis laŭ mia opinio sur kriterioj devenintaj el nacilingva pensado, sed ne de Esperanto. (Notu parenteze, ke tiun vorton *devenintaj* ĉiuj senprobleme akceptas kiel adjektivon, pro la foresto de *est!*). Verŝajne ni konsentas, ke *ata* kaj *ita* havas malsamajn signifojn. La elekto de unu aŭ alia dependas do de la ideo, kiun oni volas esprimi per

la vorto; la argumentado ekestis pro tio, ke oni ne povis interkonsenti pri la signifo de *ata*, kaj tio, kiel elokvente sed gratulinde koncize pruvis Raymond Schwartz, originis en erara prezentado en grava kaj influa lernolibro. Amiko akuzis min "atisto", kiam en la Antaŭklariĝo de mia libro "Paŝoj al plena posedo" mi skribis la frazon: "En tiu ĉi libro estas klarigataj 1,682 vortoj". Laŭ lia vidpunkto, pro la fakto, ke la libro estis jam verkita kaj presita, la vortoj evidente estas klarigitaj. Laŭ mia vidpunkto, pro la fakto, ke la klarigoj daŭre validas kaj la leganto aktuale renkontas ilin dum tralaboro de la verko, ili estas, laŭ vidpunkto de la leganto, klarigataj (dum la laboro). Konsentu kun li aŭ kun mi; sed almenaŭ tio ĉi estas certa, ke mi perfekte komprenis la koncepton, kiun mi volis komuniki al la leganto, kaj tiun koncepton transdonas *ata* kaj ne *ita*.

Mencio pri tiu libro memorigas min pri alia kritiko, kiu devenis de semantikaj miskomprenoj. Ĉifoje amikino riproĉis al mi la titolon: "Ĝi estas erariga, ĉar plena posedo de la lingvo estas neatingebla". Mi devis klarigi al ŝi, ke mi ne titoligis la verkon "Paŝoj ĝis plena posedo"; oni povas paŝi *al* io kaj neniam ĝin atingi: se oni atingas ĝin, oni paŝis *ĝis*. Jen alia ekzemplo: mi korespondis kun akademiano pri la diferenco inter *kiel* kaj *kiom* en certaj frazoj. Fine li rifuzis plu diskuti, ĵetante al mi la ŝiboleton (se ŝiboleton oni povas ĵeti!): "Ĉar Zamenhof ĉiam skribis *kiel* en tiaj okazoj!" Nu jes, sed tion mi tre bone sciis; mi efektive celis kompreni, kiun ideon Zamenhof fakte esprimis per *kiel*, ĉar laŭ

mia opinio li devis per tio esprimi *manieron*, kaj se mi volus nepre esprimi *kvanton* mi tamen devus uzi *kiom* — ĉar klare la du vortoj ne povas esti samsignifaj. Sed verŝajne tiu esplorado transrandis herezon!

Nu, revene al la verboj: la esperanta verbo estas tre simpla, kaj ni ne komplikigu ĝin ĝis tiu grado, ke ĝi fortimigas lernantojn! En Esperanto, pliprecizigon de la agotempo oni atingas per aliaj rimedoj, ekzemple adverbo aŭ prefikso. Se mi diras: *Kiam mi alvenis, mia amiko trinkis botelon da vino*, tio signifas, ke li estis meze de la trinkado, kiam mi alvenis. Se mi diras: *kiam mi alvenis, mia amiko jam trinkis botelon da vino*, tio signifas, ke la botelo estas jam malplena, kiam mi alvenas, kaj se li ne malfermos alian mi devos soifadi. Mi same povus diri: *fintrinkis botelon da vino*. (Notu, ke la unua citaĵo = estis trinkanta, kaj la dua citaĵo = estis trinkinta! Ni ĉiam disponas pri alternativoj en nia mirinde riĉa lingvo!).

Kion ni eble rajtas konkludi el ĉio ĉi? Ĉu la hindeŭropeco de Esperanto estas io tute malbona? Ne, ĝi ne estas. La ĝisnuna evoluo de la lingvo havigis al ni komunikilon tre flekseblan, en kiu abundas alternativaj dirmanieroj tiel, ke ĉiu el ni ĝuas grandan liberecon en lingvouzado ĉiurilate korekta. Iom simile al la angla lingvo, riĉa je sinonimoj pro tio, ke ĝia vortprovizo kreigis tra la jarcentoj laŭ tri tute malsamaj vojoj, nome la ĝermana, la latina kaj la mezepoka franca, Esperanto duvoje riĉigis tiel, ke ankaŭ ĝi estas riĉa je sinonimoj — nome, per la vortkonstruado kaj per la enkonduko de neolo-

gismoj plejparte hindeŭropaj. Sed tiun riĉecon ni devas konservi kaj ne detrui. Nuntempe la granda influo de la angla lingvo penetradas eĉ en Esperanton, kaj la senpripensa enkonduko de anglaj terminoj en nian lingvon, tute precipe tiam, kiam ili ne facile permesas pluformadon laŭ la vortkonstrua strukturo de la lingvo aŭ eĉ tion foje rezistas komplete, ne povas ne esti danĝera en etoso tutmonda, ĉar ĝi minacas fundamente ŝanĝi la naturon de la lingvo, forpelante la vortkunmetadon kaj kun ĝi la simplecon kaj relative facilan lerneblecon. Ni neniam forgesu, ke Esperanto estas kaj devas esti lingvo tutmonda kaj por tiu rolo, unike inter la planlingvoj, la Unua Libro kapabligis ĝin. Ĉu ne estas jam tempo, ke por ĉiu semantika ideo ni serĉu diligente iun esprimon en Esperanto antaŭ ol facilanime balastigi denove nian jam dikegan vortaron? Ni neniam forgesu, ke "riĉigo" de nia vortaro povos en la fino malriĉigi ĝin. Ni neniam forgesu, ke Esperanto estas lingvo unika, kreita por speciala celo kaj taŭga por tiu celo, dum la celo de la naciaj lingvoj estas io tute alia kaj ili maltaŭgas por nia celo: ni ne imitu ilin. Ni ne iru la vojon de la reformistoj, kiuj volis plihindeŭropigi Esperanton, ĉar ni jam plurfoje vidis la sorton de la reformprojektoj.



Du ĉinaj antikvaj rakontetoj

Ilustritaj de HE YUN



Kial ili diras malveron

EN iu antikva reĝlando de Ĉinio vivis belulo Zou Ji. Iumatene, sin rigardante en spegulo, li demandis la edzinon: “Kiu estas pli bela laŭ vi, ĉu mi aŭ sinjoro Xu?” Ŝi respondis: “Kompreneble vi. Sinjoro Xu neniel povas sin kompari kun vi.”

Sinjoro Xu estis belulo fame konata tra la lando. Zou ne kredis, ke li vere estas pli bela ol Xu. Pro tio li demandis sian kromedzinon: “Kiu estas pli bela laŭ via opinio, ĉu mi aŭ sinjoro Xu?” La kromedzino diris la samon kiel lia edzino.

Post unu tago venis al li gasto. Li do demandis la gaston. Ankaŭ tiu respondis, ke sinjoro Xu estas malpli bela ol li. Post ankoraŭ unu

tago sinjoro Xu mem venis viziti Zou. Tiam Zou Ji atente pririgardis lin: liajn vizaĝon, staturon, teniĝon, kaj kaŝe komparis sin kun li, sed li neniel povis veni al la konkludo, ke li estas pli bela ol Xu. Post la foriro de sinjoro Xu, li refoje rigardis sin en la spegulo kaj des pli sentis, ke li estas multe malpli bela ol sinjoro Xu.

Nokte Zou neniel povis endormiĝi. Li pensis kaj pensadis kaj fine venis al jena konkludo:

“Mia edzino tre amas min, kompreneble ŝi diris, ke mi estas bela. Mia kromedzino timas min, tial ankaŭ ŝi tiel diris. La gasto flatis min, ĉar li volis peti de mi helpon. Ĉu ne?”



Pentri diablon

Iu gasto venis al la reĝo de Qi-regno por servi al li per pentrado.

“Kio estas plej malfacile pentrebla?” demandis la reĝo.

“Hundo kaj ĉevalo,” respondis la gasto.

“Kio estas plej facile pentrebla?” refoje demandis la reĝo.

“Pentrado de diablo estas plej facila. Ĉar hundo kaj ĉevalo estas tre bone konataj de ĉiuj, oni povas facile trovi vian fuŝaĵon en la pentraĵo pri ili. Diablojn oni povas pentri laŭplaĉe, ĉar neniu ilin vidis kaj neniu scias, kiel ili vere aspektas,” respondis la gasto.

GRAVA PETO

Posedantoj de leteroj, fotoj, verkoj k.s. de C. Ĝolabio (precipe tiuj pri Verda Majo kaj Liu Ren dum ilia loĝado ĉe Ĝolabio en Hongkongo), estro de Hongkonga E-Asocio en la 30-aj jaroj kaj delegito de UEA en la 40-aj, bv. skribi al lia edzino s-ino Censinio, Poŝtkesto 4023, Shanghai, Ĉinio.

UEA ESTAS 75-JARA

OKAZE de la 75-jara jubileo de UEA, la urboestro de Rotterdam, s-ro A. Peper akceptis delegacion de UEA en la urbodomo, la 15-an de aprilo. Partoprenis la estraranoj de UEA, venintaj al Rotterdam por la laborkunsido, pluraj oficistoj de UEA kaj reprezentantoj de aliaj nederlandaj E-organizajoj.

UEA fondiĝis en la 28-a de aprilo, 1908, laŭ la iniciato de s-ro H. Hodler kaj aliaj kaj havas sian sidejon en Rotterdam dum pli ol 25 jaroj.

La urboestro gratulis UEA pro ĝia 75-jara ekzisto kaj deziris pli grandajn sukcesojn en la laboro. Li aparte menciis, ke Ĉinio, kiun li vizitos oktobre ĉi-jare, tre bezonas E-on, kiu ebligos ŝpari al milionoj da ĉinoj tempon por lerni fremdajn lingvojn.

S-ro G. Maertens, prezidanto de UEA, sincere dankis la urboestron pro lia akcepto kaj la fa-



S-ro G. Maertens, prezidanto de UEA (dekstre), donacas al la urbestro de Roterdamo (maldekstre) la libron "Guido Gezelle".

voro kaj subteno de Rotterdam al UEA kaj ĝia Centra Oficejo kaj esperis plifortigi kaj plintensigi la kontakton kaj kunlaboron kun la urbo kaj urboestro, precipe okaze de la Jubilea Jaro de Esperanto. En la nomo de UEA li donacis al la urboestro la libron "Guido Gezelle", luksa kolekto de poemoj de la flandra verkisto en pluraj lingvoj, inkluzive de Esperanto.

dra verkisto en pluraj lingvoj, inkluzive de Esperanto.

En la 15-a de aprilo "Rotterdam Nieuwblad" (Rotterdamana Ĵurnalo) aperigis intervjuon de sia raportisto al s-ro S. Macgill, direktoro de la Centra Oficejo de UEA. La artikolo konigis Esperanton, E-movadon kaj UEA ĝenerale.

Gratulo al la nova estraro de Akademio de Esperanto

Laŭ la cirkulero n-ro 140 de la Akademio de Esperanto nova estraro de la Akademio jam estis elektita la 28-an de junio, 1983.

D-ro A. Abault (Francio) elektiĝis kiel prezidanto; d-ro P. Neergard (Danlando) kaj prof. S. Ĝugev (Bulgario) kiel vicprezidantoj; d-ro W. Bormann (F.R. Germanio) kiel sekretario. Varman gratulon ni esprimas al ili ĉiuj.

dantoj; d-ro W. Bormann (F.R. Germanio) kiel sekretario. Varman gratulon ni esprimas al ili ĉiuj.

CINAJ FAMAJ ESPERANTISTOJ SUR GRAVAJ POSTENOJ

En junio ĉi-jare okazis en Pekino la Unua Sesio de la Sesa Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko kaj samtempe la Unua Sesio de la Sesa Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco (TK de ĈPPIK). Inter la ĉeestantoj de tiuj du gravaj sesioj estis 46 esperantistoj, membroj de "Amikoj de Esperanto" kaj subtenantoj de Esperanto. En la sesioj Hujucz, la prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, kaj Zhou Gucheng, membro de "Amikoj de Esperanto" kaj fama historiisto, estis elektitaj kiel vicprezidantoj de la Konstanta Komitato de la Sesa Tutlanda Popola Kongreso; Bakin, vicprezidanto de ĈEL kaj fama verkisto, Zhao Puchu, unu el la iniciatintoj de "Amikoj de Esperanto" kaj la prezidanto de la Ĉina Budhista Asocio, Ye Shengtao, unu el la iniciatintoj de "Amikoj de Esperanto" kaj fama edukisto, kaj Zhou Peiyuan, membro de "Amikoj de Esperanto" kaj la prezidanto de la Ĉina Scienca kaj Teknika Asocio, estis elektitaj kiel vicprezidantoj de la Sesa Tutlanda Komitato de ĈPPIK. Krome, inter la membroj de la Konstanta Komitato de la Sesa Tutlanda Popola Kongreso sin trovas aliaj 9 membroj de "Amikoj de Esperanto" kaj subtenantoj de Esperanto, inkluzive de Chu Tunan, la prezidanto de "Amikoj de Esperanto"; kaj en la Sesa Konstanta Komitato de ĈPPIK troviĝas 6 membroj de "Amikoj de Esperanto" kaj subtenantoj de Esperanto.

FONDIĜIS LA NANNING-A ESPERANTO-ASOCIO

De la 25-a ĝis la 27-a de majo okazis kunveno por fondi la nomitan asocion en Nanning, la ĉefurbo de la Guangxi-a Ĝuang-nacieca

Aŭtonoma Regiono. La kunvenon prezidis Wei Hua, vicprezidanto de la Nanning-a Literaturista kaj Artistista Federacio, kaj ĝin ĉeestis 150 esperantistoj kaj gastoj, inkluzive de Qin Si, vicprezidanto de la Guangxi-a Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj la prezidanto de la Lingva Instituto de la regiono, kaj Feng Qixun, vicestro de la Propaganda Departemento de la Nanning-a Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio. La kunveno aprobis la statuton de la asocio kaj elektis ĝiajn gvidantojn. En ĝi oni faris interŝanĝon de la sperto en esplorado de Esperanto kaj disvolvado de la Esperanto-movado. La fondiĝo de la Esperanto-Asocio certe antaŭenpuŝos nian movadon en tiu regiono.

JARKUNVENO DE LA PREPARA KOMITATO DE LA LIAONING-A ESPERANTO-ASOCIO

En la 29-a de majo la Prepara Komitato de la Liaoning-a Esperanto-Asocio okazigis la unuan jarkunvenon en Shenyang. Ĝin partoprenis 88 samideanoj el Shenyang, Anshan, Dandong, Fushun, Dalian, Jinzhou kaj aliaj 3 urboj.

Zhang Jiasheng, respondeculo de la Prepara Komitato de LEA, faris raporton titolitan "Esperanto-movado de 1979 ĝis 1983 en Liaoning-provinco"; Xu Shuren, respondeculo de la Liaoning-a Federacio de Socisciencaj Asocioj, kaj samideano Yu Weiping faris paroladojn pri la direkto de la Esperanto-movado de Liaoning-provinco kaj la taskoj de LEA. Pri tiuj raporto kaj paroladoj oni faris diskutadon.

RAPORTO PRI ESPERANTO EN "CHINA DAILY"

La 25-an de majo la ĉina angla-lingva ĵurnalo "China Daily" aperigis la artikolon "Kreskanta Intereso por Studo de Esperanto", skribitan de ĝia raportisto post intervjuado al Zhang Qicheng, la ĝenerala sekretario de ĈEL, kaj Li Shijun, vicĉefredaktoro de EPC. La artikolo raportis al la legantoj pri la historio de la ĉina Esperanto-movado kaj ties progreso en la lastaj jaroj.

ESPERANTO ESTOS OFICIALA LINGVO DE LA AKADEMIO

El San-Marino: La 26-an de majo 1983 la Nacia Konsilantaro

Ĉinaj eldonaĵoj en la "Forumo de la Asocioj" en Rueil-Maison, Francio



de la Respubliko San-Marino decidis unuanime starigi Internacian Sciencan Akademion por flegi la kunlaboron de universitataj kaj aliaj esploroj diverslandaj. La akademio ĝuos la apogon de UNESKO. Krom la laborlingvoj de UNESKO kaj krom la itala kiel ŝtatlingvo san-marina, ankaŭ la Internacia Lingvo estos oficiala lingvo de la Akademio.

Ekde julio 1983 internacia prepargrupo el universitataj profesoroj ellaboros kune kun la direktoro de la San-Marina Instituto pri Cibernetiko, Aureliano CASALI, la regularojn por la akademianigo, docentigo kaj doktorigo. Pri ili la Nacia Konsilantaro faros decidon en novembro ĉi-jare, por ke la Akademio akceptu antaŭ la jarfino la unuajn tezojn. Ĉi tiuj estu verkotaj dulingve: en la Internacia Lingvo kaj en nacia lingvo elektebla por la kandidatoj mem.

La plej maljuna memstara eŭropa lando fariĝos verŝajne la unua ŝtato de la mondo, kiu oficialigas la Internacian Lingvon kiel laborlingvon de iu institucio sia.

INSIGNOPINGLOJ PRETIGITAJ POR LA 69-A UK

El Kanado: Por reklami la 69-an Universalan Kongreson okazontan en Vankuvero, Kanado, en 1984, la LKK pretigis limigitan kvanton da oficialaj kongresaj insignopingloj. Ili estas unika kanada fabriko el arĝentizita metalo, kaj ĝia proksimuma grandeco estas 22×17 mm. Ĝi montras la kongresan simbolon (indiana totemfosto) kun la vortoj "69a UK de Esperanto", kaj en la fono estas verdkolora kvinpinta steleto.

La pingloj jam nun estas haveblaj: aŭ *pogrande* (min. kvanto 10) ĉe LKK (53 North Boundary, Vancouver, B.C. V5K 3S4) kontraŭ po \$3 kan.+ sendkosto; aŭ *podetale* ĉe la Libroservo de K.E.A. (765 Braemar, R.R.2, Sidney, B.C. V8L 3S1), aŭ ĉe via landa Esperanto-organizaĵo, kontraŭ \$4 kan.+ sendkosto.

AKTIVADOJ DE FRANCAJ ESPERANTISTOJ

El Francio: (1) En januaro ĉi-jare S-ro Louis Z. Enizan kaj lia edzino Zorka Enizan partoprenis

grandan forumon en Rueil kaj aranĝis specialan angulon per ĉinaj eldonaĵoj dum sia dutaga ekspozicio. La francoj ĝenerale estas scivolemaj pri la ĉinaj okazaĵoj, kaj multnombraj estis la demandoj pri la E-movado en Ĉinio.

(2) La 1-an de majo en Parizo, kadre de impona manifestacio, dukado da pariz(region)aj SAT- kaj SAT-Amikaraj gekamaradoj montrigis kun banderolo "Travailleurs unissezvous — Esperanto — Laboristoj Unuiĝu". Ili disdonis ankaŭ ĉirkaŭ 5000 flugfoliojn, tiel ke entute multaj homoj eksciis aŭ sciis iom pli pri Esperanto kaj ĝia nuna situacio.

ARANĜI VIZITON AL ĈINIO

El Britio: S-ino Nancie Durham informas, ke pro nesufiĉaj partoprenantoj por sia esperantista turisma grupo al Ĉinio en aŭgusto ĉi-jare ŝi decidis rearanĝi la viziton por la tempodaŭro inter la 14-a de aprilo kaj la 5-a de majo venontjare, se ŝia nova reklamado sukcesos.

(Daŭrigo de p. 14)

formiĝinte pri tio, la pacigisto opiniis, ke la aferoj estas bagatelaj, tial li ne iris solvi ilin ĝustatempe. La konfliktoj fariĝis pli kaj pli seriozaj kaj fine kaŭzis interbatadon.

En la komenco la popolaj pacigaj komitatoj estis starigitaj nur en loĝkvartaloj de la urboj kaj brigadoj en la kamparo. Tiam fabrikoj, minejoj kaj entreprenoj ne intencis starigi tiajn organizojn. Tamen fine la komitatoj ege interesis ilin per siaj rimarkindaj efikaj laboroj.

Respondeculo de la Changzhou-a Tria Kotonteksejo kun

3 000 laboristoj diris: "Nia paciga komitato estas fondita sub premo de amasego de konfliktoj."

Komence, kiam oni proponis establi pacigan komitaton, li opiniis tion superflua, ĉar laŭ li la diversnivela administraj organoj en la entreprenoj jam sufiĉas por solvi la kontraŭdirojn.

Sed li ne komprenis, ke ankaŭ pacigo de civilaj konfliktoj estas scienco. Kvankam en ĉiu entrepreno estas kompleto da administraj organoj, tamen mankas al ĝi kompetentuloj, kiuj povas solvi konfliktojn laŭ leĝoj, rezulte de tio, pli kaj pli multiĝis konfliktoj, kies solvon devas plenumi fabrikoj gvidantoj.

Kelkiam ili eĉ ne povis kviete labori kaj ripozi, ĝenate de tiuj konfliktoj.

La fakto bone edukis la respondeculojn de la fabriko, ke ili fine konsentis starigi pacigan komitaton. Post lernado la elektitaj pacigistoj konas leĝojn kaj estas spertaj en repacigo de konfliktantoj. En la unua jaro post la establo de la paciga komitato, ĝi jam solvis 105 konfliktojn. Ĝi ne nur solvis ĉiujn malnovajn konfliktojn, sed ankaŭ propagandis la leĝojn inter la popolamasoj kaj ĝustatempe preventis iujn konfliktojn.

Nun ĉ. 110 000 fabrikoj kaj entreprenoj en Ĉinio jam starigis pacigajn komitatojn.

EKSTER TRIBUNALO

EN Ĉinio, se aperas civilaj kaj negravaj kriminalaj konfliktoj, ekzemple, filo malbone traktas sian maljunan patron, geedzoj petas eksedziĝon pro malakordo, bopatrino kaj bofilino malpaciĝas, k.a., ili ofte estas ĝustatempe solvitaj per helpo de parencoj kaj amikoj. Ĝenerale, oni ne bezonas prezenti ilin al tribunalo.

Ĉinio havas tradicion solvi kontraŭdirojn inter popolanoj per pacigo kaj interkonsiliĝo. Nun ĝenerale en la urboj kaj la kamparo fondiĝis popolaj pacigaj komitatoj. Laŭ statistiko, ĝis la fino de 1982, troviĝis sume 860 049 tiaj organizoj en la tuta lando.

La popola paciga komitato estas laŭleĝa amasa organizo,

kiu plenumas sian laboron sub la gvido de la bazaj popola registaro kaj kortumo. Ĝia tasko estas pacigi ordinarajn konfliktojn inter popolanoj kaj samtempe propagandi inter la loĝantoj politikojn, leĝojn kaj dekretojn kaj fari edukon pri moralo.

La paciga komitato estas establita en kadro de loĝ-kvartalo en urbo kaj brigadoj en la kamparo. Ĉiu komitato konsistas el 5—11 membroj elektitaj de la popolamasoj per demokratia rimedo. En la komitato funkcias unu estro kaj 1-2 vicestroj. La elekto okazas en ĉiu dua jaro, kaj ĉiuj membroj rajtas esti reelektitaj. Se iu el la komitatanoj malobservas leĝon, malbone plenumas sian funkcion aŭ estas ne kompetenta en sia ofico, la

koncerna unuo, kiu elektis lin, rajtas eksigi lin en ĉiu ajn tempo.

La paciga komitato ne estas justica organizo nek ŝtatpotenca organo. Ĝi faras pacigon per admono, eduko kaj propono laŭ la peto de koncernatoj kaj amasoj. Kompreneble, ne ĉiuj konfliktoj nepre devas esti solvitaj de la komitatoj, oni povas prezenti ilin rekte al tribunalo.


La paciga komitato difinas ankaŭ necesajn disciplinojn observendajn en la laboro. Kiel ekzemple, estas malpermesite akcepti donacojn de koncernatoj kaj malkaŝi iliajn sekretojn; Dum pacigo komitatanoj devas atenteme aŭskulti opiniojn de koncernatoj, fari profundan esploron por bone koni la aferon, sin apogante sur la amasoj, kaj kun pacienco doni admonon al koncernatoj.

La okcidenta Chang'an-strato de Pekino troviĝas en la centro de la urbo. Tie funkcias 35 loĝ-kvartalaj komitatoj kun pli ol 25 000 familioj kaj pli ol de la urbo. Tie funkcias 35 pacigaj komitatoj kun 175 membroj.

Por pli bone plenumi sian laboron, ĉiuj pacigaj komitatoj de tiu ĉi strato starigis sub si kelkajn pacigajn grupojn. Se okazas konfliktoj, la pacigaj grupoj tuj ekkonas pri tio kaj donas ĝustatempan solvon. Dank' al ilia efika laborado, ne okazis maligna juĝafero estigita pro

Yuan Shuzhen (dekstre), estro de la paciga komisiono de Lianzistrateto, Pekino





Membroj de la paciga komisiono de la Okcidenta Chang'an-strato, Pekino

akriĝo de ordinara kverelo en la lastaj jaroj.

Laŭ la plej nova statistiko, en Pekino estas sume ĉ. 2 300 loĝ-kvartalaj pacigaj komitatoj kun pli ol 14 000 membroj; en ĝia antaŭurba kamparo troviĝas 3 900 tiaj organizoj kun 28 000 membroj.

Kompreneble, la menciitaj komitatoj ne povas anstataŭi tribunalojn kaj publik-sekurecajn organojn, sed ili povas multe helpi la lastajn en ties laboro.

Estis ekzemplo:

Du familioj de Jiang kaj Gu en Waixiangua-strato de Ŝanhajo kverelis inter si. Ding Kexiu, emerita laboristo kaj volontulo-pacigisto, iris pacigi ilin. Sed li estis mokita kaj preskaŭ falpuŝita de la filo de Jiang.

Por koni klare la kaŭzon de la kverelo, maljuna Ding foje kaj refoje vizitis Jiang kaj Gu. La afero estis, ke Jiang pretis amasigi brikojn en publika loko por ripari sian domon, sed Gu malpermesis tion. Maljuna Ding opiniis, ke Jiang ne estas kulpa en tio. Li do pacience

persvadis la familion de Gu. Fine la lasta konsentis cedi la lokon. Ofendinte maljunan Ding, la filo de Jiang timis, ke Ding juĝos la aferon malfavore al lia familio. Sed kiam li revenis hejmen de laboro kaj informiĝis, ke ĉio bone solviĝis, li sentis kaj ĝojon kaj bedaŭron.

Lastjare en Ŝanhajo kun dek milionoj da loĝantoj okazis pli ol 10 000 tiaj konfliktoj, inter kiuj 9 200 estis solvitaj de loĝ-kvartalaj pacigaj komitatoj. Tiu nombro estis 6.7-oblo de la juĝaferoj faritaj de la popolaj kortumoj en la sama jaro.

Ankaŭ granda nombro da civilaj konfliktoj en la skalo de la lando estas solvita per pacigo. Laŭ nekompleta statistiko, en 1982 la nombro de la pacigitaj civilaj konfliktoj de diversaj lokoj de nia lando superis ok milionojn, kiuj estis 10.5-oblo de la juĝaferoj traktitaj de la juĝejoj en la sama jaro.

La pacigaj komitatoj kapablas solvi konfliktojn, kiuj probable kaŭzos seriozajn sekvojn. En majo de 1982, Zhou Yin'e, ko-

munumanino de Gongxiang-brigado en la gubernio Wuxian de Jiangsu-provinco, diris al la taĉmentestro, ke la kondutoj de grupestro Zhou Shuilin kaj Han Meiyong estas malhonestaj, tial la lastaj estis pridemanditaj de la taĉmentestro. Zhou Shuilin kaj Han Meiyong tre koleris pro tio kaj batvundis ŝin. En la mezo de aŭgusto, Zhou Yin'e mortis de leŭkemio. La familiajnoj de la mortinto opiniis, ke la batado fare de Zhou Shuilin kaj Han Meiyong kaŭzis la morton de Zhou Yin'e. Ili asertis, ke ili venĝos la mortinton, kaj postulis, ke la batintoj pagu por ŝiaj kuracado, funebra ceremonio kaj enterigo kaj vivtenu ŝiajn gefilojn. La brigada pacigisto kaj komunuma justica asistanto kune faris paciencajn pacigon al ambaŭ flankoj, ke ili fine atingis interkonsenton, ke la batintoj Zhou kaj Han parte pagu por la kuracado laŭ la graveco de la batvundo.

En 1982 okazis en Wuxian ĉ. 50 tiaj kazoj, inter kiuj 16 estis solvitaj sub la rekta helpado de tribunaloj kaj 40 estis solvitaj de la komunumaj pacigaj organizoj. Laŭ statistiko, en 1982, 10 000 homoj en la tuta lando evitis probable nenormalan morton dank' al la klopodado de la diverslokaj pacigistoj.

Kompreneble, ne ĉiuj konfliktoj estis bone solvitaj de pacigistoj. Ekzemple, en iu produktanta brigado de la Nankina antaŭurbo okazis du konfliktoj: Unu temis, ke taĉmentestro difektis plantojn de iu komunumano dum fosado de kanaletoj, kaj la alia temis, ke pro neatento komunumano Wu Jifa rompis stal-trogon de alia komunumano dum transportado de ŝtonoj. In-

(Daŭrigata sur p. 12)

KIEL MI SOLVIS ILIAJN KONFLIKTOJN?

JAM tri jarojn mi okupiĝis pri la paciga laboro por loĝantoj. Sub nia loĝantara komitato estas 780 familioj kun 2 650 personoj. Laboras tri profesiaj kaj 56 neprofesiaj pacigistoj en kelkaj grupoj servantaj ĉiu unu loĝkvartaleton. Verdire la laboro estas tre ŝarĝa.

Mi aĝas 50 jarojn. Mi estis sekciestrino de iu ŝtata institucio. Antaŭ tri jaroj mi anticipis emeritiĝis pro malsano. Loĝkvartalaj oficistoj deziris, ke mi laboru kiel popola pacigisto, tamen tion mi vere ne volis en la komenco. Por fari pacigan laboron, oni devas kontaktiĝi kun homoj, kiuj emas bataladi, kiuj malbone traktas siajn maljunajn gepatrojn, kiuj volas nuligi sian geedzecon, kiuj . . . Ĉu tio ne signifas, ke oni implikas sin mem en tiajn komplikajn aferojn? Ankaŭ mia edzo ne konsentis pri tio. "Ni estas liberaj de zorgoj pri manĝo kaj vestoj. Ni vivas senzorgan vivon," li diris. "Tage ni promenas en parko kaj vespere televidas hejme. Se longa sidado en la domo nin enuas, ni povas viziti parencojn aŭ amikojn. Kia senĝeneco!"

Jes, jam plenkreskis niaj tri gefiloj, kiuj ne bezonas nian

zorgadon. Plie, mi laboris dekojn da jaroj kaj nun mi, malsana emerito, rajtas ripozi senzorge en la hejmo. Mi decidis nepreni sur min tian penigan laboron.


Tamen loĝkvartalaj oficistoj elokvente persvadis min. Ili unue partoprenigis min en studo pri juro. Koni kaj observi la leĝon estas devo de ĉiu civitano. Tio iom post iom vekis mian intereson. Prezidanto Zhang de la loĝantara komitato, kiu prizorgis nian studon, rakontis al ni terurajn aferojn. Ekzemple, iu knabino sin mortigis per veneno pro perfido de sia amato; iuj najbare loĝantaj bategis unu la alian eĉ pro bagateloj; kaj iu eksplodema viro eĉ vundis sian edzinon pro ŝia insulto. Zhang diskutigis nin pri kaŭzoj de la okazajoj kaj rimedoj por ilin preventi.

Trovi respondon estis tre facile por mi, iama sekciestro, tamen mia koro malkvietiĝis post la studo. Mi pensis, kiel bone estus, se oni admonus la koncernatojn, ke la malagrabloj ne okazu. Mia antaŭa decido ŝanceliĝis. Kaj kiam prezidanto Zhang demandis min refoje, ĉu mi ŝanĝis mian opinion, mi di-

ris: "Se vi tiel fidas min, mi do provu."

Tuj kiam mi ekprenis la laboron, mi eksciis, ke ĝi estas multe pli malfacila ol la ofico de sekciestro. En la komenco mi komprenigis al la koncernatoj tiun ĝeneralan veron. Ekzemple, mi persvadis iun instruiston: "Ĉu decas al vi, edukanto, tiel kvereli?" Sed vane laboris mia lango. Poste mi iris al aliaj loĝkvartaloj por lerni ilian sperton pri paciga laboro. Mi ekkomprenis, ke ankaŭ en tiu laboro estas multaj scioj studendaj. Dum la pacigado oni devas observi la netuŝeblecon de la leĝo kaj racie solvi la problemojn, t.e. principo kaj modereco ambaŭ estas necesaj kaj enketeto tre grava, distingi pravon disde malpravo kaj sur tiu bazo forigi la malagrablojn inter la konfliktantoj.

Foje mi devis doni helpon al solvo de la konflikto inter la familioj de Qin kaj Li. Qin Zhong, filo de maljunulo Qin, ekamis knabinon Li, laboristinon de la Fridigejo de la Okcidenta Distrikto de Pekino. Komence, kiam ŝi vizitis lian familion, liaj gepatroj sin montris tre afablaj kaj ĉiufoje regalis ŝin



Wang Peihua (la unua de maldekstre) faras pacigan admonon.

per teo kaj bombonoj. Poste kiam la gejunuloj komencis plani la geedziĝon, la maljunulo subite malkonsentis pri ilia amafero kaj ordonis sian filon rompi kun ŝi, pretekstante, ke ŝi iom strabas, kaj eble heredigostion al sia estonta ido. Tio tre kolerigis Qin Zhong, kaj estiĝis konflikto inter la patro kaj la filo. Antaŭ la konflikto Qin Zhong oficvojaĝis al alia loko kaj konsumis 300 juanojn, kiujn la knabino donis al li. Nun la gepatroj de la knabino venis por repreni la monon. La knabino ploregis kaj volis sin mortigi. Leviĝis granda kverelo inter la du familioj.

La patrino de Qin Zhong venis al mi por peti mian helpon. Mi rapidis al la loko, haltigis ilian kverelon kaj demandis pri la afero. Mi opiniis, ke mi devas unue informiĝi pri la motivo de la maljunulo. Ĉe mia insisto lia edzino diris al mi la veron: La maljunulo Qin deziris, ke la knabino aĉetu meblojn kaj aliajn necesajojn kaj aranĝu luksan

festenon por la geedziĝo, ĉar la ekonomiaj kondiĉoj de ŝia familio estis multe pli bonaj ol tiuj de la lia. Sed la filo oponis. Jen kial malpaciis la patro kaj la filo.

Mi pensis, ke la kverelo leviĝis ĉefe pro la maljunulo. Kiel persvadi tiun obstinan homon? Antaŭe lia filo drinkadis kun malbonkondutaj junuloj kaj laboris maldiligente. Mi aŭdis de liaj najbaroj, ke dank' al la admono de sia amatino li ĉesis fumi kaj drinki kaj komencis fari hejmlaborojn. Pro tio mi laŭdis la knabinon antaŭ la maljunulo kaj li kapjesis. Mi ankaŭ trankviligis lin, ke ŝia strabismo ne herediĝos kaj li devas ĝoji, ke li havos tiel talentan kaj bonkoran knabinon kiel sian bofilinon. Mi diris al li, ke li ne devas multe postuli de la knabino, kvankam ŝia familio estas bonhava, kaj la geedziĝa ceremonio devas esti aranĝita ŝpareme, laŭ la nova moro. La maljunulo Qin ekridis pro honto.

Post mia plurfoja persvado la maljunulo fine konsentis pri ilia

geedziĝo. Li venigis lignajiston por fari meblaron. En la Printempa Festo de 1982 li edzigis sian filon al la knabino.

Tio komprenigis min, ke oni povas solvi konflikton, se oni senlace faras pacigajn admonojn. Sed la laboro ne iras ĉiam glate.

Yao Erpeng kaj Liu Yihua najbare loĝas multajn jarojn. Ili ofte konfliktis pro bagateloj. Foje ili kverelis pro sunumado de vestoj kaj neniu el ili cedis. Yao donis survangan al Liu. Ĉi tiu ne volontis perdi sian virinan dignon kaj anhelante kuris al juĝejo por akuzi la batinton. Enketinte pri la afero, la juĝejo kondamnis Yao al monpuno de 70 juanoj.

Post tio la du familioj ŝajne kvietiĝis, sed fakte pli kaj pli malamamis unu la alian. Post nelonge ili denove kverelis, eĉ pli ofte ol antaŭe. Iam ili bruegis profundan nokton, ke la najbaroj ne povis trankvile dormi. Iun tagon mi iris pacigi ilin. Apenaŭ mi diris kelkajn vor-

tojn, Yao jam ĵetis malvarman rigardon al mi: "Ne zorgu pri nia afero, kaj vi ne povas solvi ĝin."

Tiuj vortoj tre kolerigis min, ke mi volis tuj foriri. Sed la konflikto estis jam tre akra. Neimagebla malfeliĉo sekvas, se ĝi pli graviĝus. Kiel popola pacigisto, mi ne povis lasi ĝin.

Mi do vizitis iliajn kvar najbarojn por informiĝi pli detale. Ili diris, ke la malagrablajn kaŭzis ĉefe la mastrinoj de la du konfliktantaj familioj. Yang Fengmin, la edzino de Yao Erpeng, profitema kaj impertinenta, ofte postdorse klaĉis kontraŭ Liu Yihua antaŭ sia flamiĝema edzo, ke li sin turnadis al Liu por sin ĉikani.

La najbaroj diris al mi ankaŭ, ke antaŭe la du familioj respektis unu la alian kaj tenis bonajn rilatojn inter si. Liu Yihua plurfoje helpis Yang Fengmin dum ŝia postakuŝa ripozo, ankaŭ Yao siavice donacis fruktojn al Liu. Mi do memorigis ilin pri la bonoj faritaj de la kontraŭa flanko. Tio ne efikis, sed male vekis ilian ankoraŭ pli grandan koleron. Ili atribuis maldankemon unu al la alia.

Malsukcesis la paciga admono, sed mi ne perdis la paciencon. Mi scias, ke Yao Erpeng estas flamiĝema, tamen malkaŝema. Li facile akceptas mian admonon, se mi bone klarigas al li la veron. Mi kritikis lin, ke li ekscitiĝis de malgrandaj bagateloj kaj kverelis pro ili. Mi admonis lin, ke li analizu ĉion, kion diris lia edzino, anstataŭ kredi ĝin sendistinge. Mi diris, ke li imagu, kio sekvas el lia nehaltigebla kolero. Li aŭskultis kaj mallevis la kapon.

Poste mi plurfoje vizitis la du familiojn por fari pacigajn ad-

monojn. Mi ankaŭ petis gvidantojn de la fabriko, kie laboras Yao, interveni en la aferon. Kiam la konfliktantoj ekhavis sincerecon repaciĝi, mi kunsidigis ilin kaj iliajn fabrikestrojn. En la kunveno ĉiu el la konfliktantoj sincere diris sian opinion, serĉis kaŭzojn de la malpaco kaj kritikis nur sin mem. Fine solviĝis la konflikto, kiu daŭris plenan jaron. Malstreĉiĝis mia koro. Du jaroj pasis, mi ne plu aŭdis ilian kverelon.

En la pasinta jaro ni solvis 23 tiajn konfliktojn grandajn kaj malgrandajn. Mi estis tre okupita de la laboro — iafaje oni sin turnis al mi en la tempo de tagmanĝo, eĉ nokte oni vekis min el la dormo. Mi ofte renkontis maljustajn kritikojn kaj riproĉojn. Sed mi baniĝis en neespimebla ĝojo, kiam mi solvis tiajn kaj ĉi tiajn konfliktojn, kiam la repacigitaj geedzoj kun sia infano venis al mia hejmo por danki min, kaj kiam malamikaj najbaroj ekvivis denove en paco.

** La aŭtoro estas estro de la paciga komisiono sub iu loĝantara komitato en la Okcidenta Distrikto de Pekino.*



Tarifo: 1 internacia respondkuponon por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

- * Biblioteka E-grupo (Miŝkolc-23, Pf-101, H-3523, Hungario) abonos HUNGARAN VIVON por 1984 al tiuj E-grupoj, kiuj ĝis la fino de novembro rekomendite sendas al ni 18 ekz. da diversaj numeroj de EPĈ (EPĈ = 6 usonaj dol., Hungara Vivo = 11 usonaj dol. por unu jaro). La adreso povas esti skribita nur per latinaj literoj, kaj la grupoj la numerojn ricevos rekte.
- * S-ro Stanislaw Fischer, ul. Bulgarska 8/8, P1-64-100 Leszno, Pollando, deziras korespondi tm. pri ŝako, fiŝkaptado kaj interŝ. pm., bk. kaj ŝako-librojn.
- * Nagy Lajosne (Krisztina), Szekesfehervar, Munnich 65 IV/15, 8000 Hungario kaj Bankuti Jozsefne (Elvira), Szekesfehervar, Jozsef A.U. 27 IX/27, 8000 Hungrio, ŝatus korespondi kun ĉinaj junuloj.
- * 30 junaj esperantistoj deziras korespondi tutmonde. Skribu al instruisto: Valdemir Moreira, Av Eurico Dutra, 380 16370 — Promissao — SP — Brazilo.
- * Esp.-grupo de mezlernejaj lernantoj volus korespondi tm., precipe el Azio, Sud-Ameriko kaj Afriko. Skribu al instruisto: Janusz Szczepanowski, ul. Sportowa 12, 67-200 Głogow, Pollando.

ĴUS APERIS LA DUA ELDONO DE LA KOLORA INFANLIBRO

KONSTRUI NOVAN PONTON

Ligna ponto rompiĝis pro torento. Kvar intimaj amikoj, sciureto, leporeto, ĉimpanzo kaj elefanto, volis konstrui novan ponton, sed ruza vulpo malhelpis ilin per trompo kaj minaco. Ĉu ili sukcesis aŭ ne? Legu la belan libreton!

ELDONITA DE LA ĈINA ESPERANTO-ELDONEJO

164 × 186mm. 40 paĝoj kun 37 koloraj bildoj

Numero: 88-Es-156p Prezo: £0,22 US \$ 0,40



Mendu ĉe: Libroservo de UEA
Peranto de EPC

aŭ Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj
(GUOJI SHUDIAN), P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio



Ĉinaj kuracistoj eksterlande

Ĉina kuracistino servas en Somalio.

Ĉinaj kuracistoj servas al paŝtistoj en Alĝerio.






Cinaj masaĝistoj masaĝas malsanulon en la Unuiĝintaj Arabaj Emirejoj.

Reprezentanto de la Unuiĝintaj Arabaj Emirejoj tondas rubandon ĉe la inaŭguro de la ĉina ambulatorio.




Ĉina akupunkturisto servas en la Unuiĝintaj Arabaj Emirejoj.





Ĉina pediatrio faras korpan ekzamenon al infanoj en Sudano.





Replantita mano

Osmin estas presisto de Relizane en la okcidenta parto de Alĝerio. Dum laborado lia dekstra mano estis detranĉita de maŝino. Ĉinaj kuracistoj en kunlaboro kun alĝeriaj kolegoj faris al li operacion por replanti la manon. Post la operacio lia mano baldaŭ reakiris la kapablon dank' al zorgema flegado. Ĉi tie estas fotoj pri lia vundita mano antaŭ kaj post la operacio.



Ĉinaj kuracistoj eksterlande

LAŭ invitoj de disvolviĝantaj landoj, ekde 1963 Ĉinio sendis siajn kuracistojn al 43 landoj kaj regionoj de Azio kaj Afriko. En la pasintaj 20 jaroj la nombro de la ĉinaj kuracistoj senditaj eksterlanden atingis 6 500. Ili kuracis 70 milionojn da person-fojoj. Nun pli ol 1 000 kuracistoj de Ĉinio servas en 80 kuracpunktoj en 35 landoj kaj regionoj de Azio kaj Afriko. Ili aplikas kuracrimedojn ne nur de la okcidenta medicino sed ankaŭ de la ĉina medicino. Ili resanigis multajn patientojn per akupunkturo, masaĝo kaj aliaj terapioj.

La ĉinaj kuractaĉmentoj grandparte servas en Afriko, kie estas tre varme, kaj en iuj lokoj la temperaturo atingas 40-50°C. La ĉinaj kuracistoj, venintaj de la norda varmeta zono, ne alkiŝiĝas al tia klimato. Krome, en iuj regionoj, kie laboras ĉinaj kuractaĉmentoj, mankas facila trafiko kaj favoraj labor-kondiĉoj, al ili mankas eĉ akvo kaj elektro. Tamen, por la sano de la popoloj de tiuj landoj, por semi amikecon la ĉinaj kuracistoj laboras diligente. Nemalmultaj kuractaĉmentoj faris operaciojn de la koro kaj kranio kaj replanton de detranĉitaj membroj, kuracis grandarean brulvundon kaj resanigis iujn patientojn, kiuj suferis de malsano ŝajne nekurablebla. Por plialtigi la kuracnivelon de la koncernaj landoj la ĉinaj kuracistoj peneme laboras. Iuj el la kuractaĉmentoj eĉ faras medikamentojn por la helpataj lan-

doj. Ili ricevis bonan akcepton de la popoloj de la koncernaj landoj. Popolanoj de Alĝerio nomas ĉinajn kuracistojn "kamaradoj" aŭ "amikoj", kaj manpremas kun ili dirante: "Ni estas samfamilianoj."

KURACISTO REVIDIGIS KATARAKTULOJN

En Apuoshil-regiono de la norda parto de Sudano, nemalmultaj suferas de katarakto, kio kaŭzas al ili ne nur spiritan doloron, sed ankaŭ grandan malfacilon en la vivo. Ĉina okulistino Yan Lianqing volis helpi tiujn patientojn reakiri sian vidkapablon.

Kutime, oni forigas katarakton per frostiga terapio. Sed en la regiono, kie ŝi laboris, mankis frostiga ekipaĵo. Konforme al la realaj kondiĉoj ŝi kreis novan metodon por forigi katarakton kaj sukcese ĝin uzis en praktiko. Post operaciado la okuloj havas neniam deformiĝon, kaj iliaj pupiloj estas ankoraŭ en la centro de la okulglobo.

Tuj post kiam disaŭdiĝis la sukceso, laboristoj, kamparanoj kaj oficistoj, suferantaj de katarakto, venis al ŝi unu post alia por peti helpon. En la daŭro de du jaroj ŝi faris operaciojn por 791 kataraktuloj. Pro trolaciĝo ambaŭ ŝiaj genuaj artikoj suferis hidropson. Pro doloro ŝi apenaŭ povis iri. Malgraŭ tio, ŝi neniam ĉesigis sian laboron. Ŝia konduto kortuŝis sudanajn kuracistojn, kiuj kunlaboris kun ŝi en siaj ripoztagoj. Ĉe la forlaso

de Sudano la tieaj popolanoj foje-refoje petis ŝin daŭre labori tie. Ŝia sudana helpanto havas profundan amikecon al ŝi, kaj korespondas kun ŝi eĉ nun.

MANO REKUNIGITA

Mikrokirurgia operacio estas avangarda kuracarto en la nuna mondo. Por sukcesigi la operacion kaj disvastigi la kuracarton ĉina kirurgo Li Shiqi aĉetis en Ŝanhajo kompletan da mikrokirurgiajn instrumentoj kaj poroperaciajn lupeojn antaŭ sia ekveturo al Malio.

En aŭgusto de 1982 iu malia kamparano suferis malignan tumoron je la maldekstra antaŭbrako, kiu doloris lin netolereble. Loka kuracisto proponis al la patiento amputi la antaŭbrakon. Sed kirurgo Li opiniis, ke la patiento estas ankoraŭ juna kaj sin vivtenas per siaj propraj manoj. Ĉu li povus vivi sen la mano? Interkonsiliĝinte kun la loka kuracisto, li decidis fari mikrokirurgian operacion al la patiento — replanton de detranĉita membro. Aŭdinte tion, la patiento tre ĝojis kaj diris al kirurgo Li: "Kuraĝe provu la operacion! Ne gravas eĉ malsukceso."

Li ne estis certa, ĉu la operacio sukcesos, ĉar tie estas tre varme, la operacio devas daŭri 7-8 horojn, kaj la kirurgoj kaj patiento ne povos senripoze persisti tiom longe. Krome la maliaj kuracistoj neniam faris tian operacion, tial ili ne havas klinikan sperton tiuflanke kaj

estas ebleco ne bone kunlabori inter la ĉina kaj lokaj kuracistoj en la operaciado.

Por la plena sukceso, kirurgo Li kaj la malia kuracisto kune ellaboris operacian planon. Ankaŭ la loka hospitalo tutforte subtenis la operacion. La ĉefinspektoro de la hospitalo prezentis ĉiujn ostologiajn aparatojn antaŭ la ĉina kirurgo por ke li elektu por sia uzo. Kirurgo Li distranĉis la haŭton de la operaciato, interrompis la tendeton, apartigis nervojn de vejnoj, detranĉis la tumoran parton de la brako kaj poste replantis la detranĉitan manon al la antaŭbrako. Suturi angietojn estas ŝlosila parto por la tuta operacio. Portante operaciajn lupojn, li suturis angietojn zorge per mikrokirurgiaj aparatoj kaj fadeno, kiu estas pli maldika ol haro. La suturado daŭris pli ol unu horon kaj morte lacigis lin. La lasta angieto estis suturita de lia helpanto. Post kiam la angietoj estis kunligitaj, la mano baldaŭ ekhavis normalan koloron. La operacio sukcesis! Tiam ĝojo plenigis la operacian ĉambron. La ĉina kaj maliaj kuracistoj sin gratulis reciproke.

TREJNI KURACISTOJN POR SOMALIO

En Somalio de orienta Afriko kuracisto Wang Huitian, sperta pri akupunkturo, resanigis multajn malsanulojn suferantajn de reŭmatismo, poliomjelito kaj hemiplegio per pingloj.

Iu oficiro suferis de reŭmatismo multe da jaroj kaj ne povis iri. Li vizitis nemalmultajn kuracistojn, sed neniuj povis lin resanigi. Fine li venis al Wang por peti helpon. Wang kuracis lin per akupunkturo kun injekto. Post la kuracado la paciento iom post iom resaniĝis. Post du



La ministro de la Sanprotekta Ministerio de Tunizio donas al la estro de la ĉina kuraca taĉmento la ŝtatan meritateston pri sanprotekto.

periodoj da kuracado la simptomoj tute malaperis kaj la paciento jam povis iri facilmove. Por esprimi sian dankemon li donis multe da mono al la kuracisto, sed tiu lasta ĝentile rifuzis ĝin. Tiam la paciento diris: “Nu, morgaŭ mi kondukos al vi du kamelojn kiel donacon.” Wang sincere dankis lin pro lia komplezo, sed ne akceptis la donacon.

Kuracisto Wang pensis en si: “La somalia popolo ŝatas akupunkturajn terapiojn kaj mi devas ĝin instrui al somalianoj, por ke tiu lando havu siajn proprajn akupunkturajn kuracistojn.” Tial, krom fari ĉiutagan kuracadon, li lernis la lokan lingvon, kompilis lernolibron kaj funkciigis akupunkturajn kursojn. Iuj kursanoj ne konis akupunkturajn kursojn kaj dubis, ĉu oni povas kuraci nur per pingloj sen medikamento. Ĝuste tiam iu infano, suferanta de poliomjelito, estis dorse alportita de sia patro. Post kvarfoja akupunkturado la infano jam povis paŝi helpate de apogbastonetoj. Post okfoja akupunkturado ĝi ja tute resaniĝis. Kaj per tiu ĉi fakto

kuracisto Wang konvinkis la kursanojn kaj ili eklernis pli diligente.

Iuj kursanoj ne kuraĝis piki per pingloj. Wang do faris akupunkturadon sur si mem. Korktuŝite de tio, la lernantoj tuj sekvis la ekzemplon, faris provadon sur si kaj rapide ekposedis la akupunkturajn arton. Sub lia gvido la lernantoj jam kuracis 20 mil person-fojojn sen kuracakcidento. La somaliaj popolanoj tre ĝojis, ke ili jam havas siajn proprajn akupunkturistojn. La ŝtata radio-stacio de Somalio disaŭdigis la novaĵon en tri sinsekvaj tagoj. Ankaŭ ĵurnaloj en pluraj lingvoj raportis pri ĝi.

PRESTIGODONA MASAĜO

La belaj kaj riĉaj Unuiĝintaj Arabaj Emirejoj, situantaj ĉe la orienta parto de la Araba Duoninsulo kaj sude de la Persa Golfo, havas areon de 85 000 kvadrataj km. kaj 1 040 000 loĝantojn. Preskaŭ ĉiuj kuracistoj de la hospitaloj en tiu ĉi lando estas eksterlandanoj, kaj en ĝi estas 97 privataj ambulatorioj. Invitite de iu kompanio de la

lando ĉinaj kuracistoj establis en Sharjah sian ambulatorion.

Iun tagon en la pasinta jaro venis al la ambulatorio paciento, kiu suferis doloron en la lumbo jam pli ol dudek jarojn kaj malfacile iris. La paciento diris al ĉina kuracisto: "Mi venas al vi laŭ la propono de la ĉefdirektoro de la kompanio. Li diris, ke vi povos resanigi min per masaĝado; se ne, li pagos por mi."

Kial la ĉefdirektoro tiel kredis ĉinajn masaĝistojn? Antaŭlonge la ĉefdirektoro jam vidis ĝian efikon. Maje de la pasinta jaro iu germano, loĝanta tie, suferis de lumbago kaj ne povis iri rektspine. Post longtempa senefika kuracado, li fine venis al la ĉina ambulatorio. Ricevinte dufojan masaĝadon li jam povis iri rektspine kaj post kvinfoja masaĝado li preskaŭ tute resaniĝis. Sed li ankoraŭ sentis doloron en la profunda parto de la lumbo, kiam li turniĝis aŭ kliniĝis. Masaĝo-terapio ne povas efiki al profunda korp parto. Tial la ĉinaj kuracistoj kuracis lin per akupunkturo samtempe. Post dufoja kuracado la doloro de la paciento tute kvietiĝis. De tiam la ĉefdirektoro tre kredas la ĉinan masaĝ-terapion.

Por rekompenci la konfidon de la ĉefdirektoro, la ĉinaj kuracistoj faris detalan ekzamenon kaj donis precizan diagnozon al la paciento. Ili decidis kuraci lin per masaĝo kaj ĉinaj medikamentoj samtempe. Ili zorgeme masaĝis lin kaj ŝanĝis masaĝmanieron laŭ simptoma ŝanĝiĝo. Post sesfoja kuracado la paciento ne plu sentis la doloron kaj sekve la simptomoj malaperis. Post tio, kontenta rideto ĉiam aperas sur la vizaĝo de la ĉefdirektoro, kiam li parolas pri la ĉina masaĝ-terapio.

Kiel Ĉinio utiligas eksterajn kapitalojn kaj teknikojn

NUN Ĉinio energie laboras por 4-obligi la totalan produktvaloron de industrio kaj agrikulturo en la fino de ĉi jarcento. En efektivigo de tiu granda celo la ŝlosila problemo estas apliki avangardajn sciencojn kaj teknikojn. Laŭ la principo pri utiligo de eksteraj helpoj surbaze de sinapogo sur la propraj fortoj, Ĉinio jam komencis utiligi alilandajn kapitalojn kaj enkonduki avangardajn teknikojn en la lastaj jaroj.

LA PORDO MALFERMITA

Ĉinio aplikis diversajn formojn por utiligi alilandajn kapitalojn, ekz. monsumojn pruntedonitajn de fremdlandaj registaroj kaj internaciaj financaj organizoj, fremdlandajn valutojn alpruntitajn pere de la ĉinaj bankoj, kapitalojn pruntedonitajn de fremdaj bankoj al la aĉetantoj ktp. Pli grava formo estas akcepti investojn rekte el aliaj landoj. Antaŭ la fino de 1982, Ĉinio jam akceptis 1.769 miliardojn da usonaj dolaroj rekte investitajn de fremdaj landoj, inkluzive pli ol cent milionojn da usonaj dolaroj investitajn de 83 akciaj entreprenoj, inter kies posedantoj estas komercistoj de Usono, Japanio, la Filipinoj, Francio, FR Germanio, Svisio, Danlando, Aŭstralio, Tajlando, Norvegio, Svedio, Hongkongo kaj aliaj landoj kaj regionoj. La pli ol 700 kontraktaj kunlaboraj objektoj ricevis fremdlandan investon de 2.7 miliardoj da usonaj dolaroj. Nun estas pli ol dek objektoj kunlabore entreprenataj kun fremdaj komercistoj por

prospektori kaj ekspluati submaran petrolon, kiuj ricevis alilandajn kapitalojn de ĉ. miliardo da usonaj dolaroj. Krome, Ĉinio ankaŭ subskribis pli ol 800 kompensajn negocajn kontraktojn kun fremdaj komercistoj, kiuj investis sepcent milionojn da usonaj dolaroj. Utiligante tiujn alilandajn investojn, precipe la rektajn, Ĉinio enkondukis avangardajn teknikojn kaj administrajn spertojn, fortigis sian ekspluatadon de energio, konstruadon de havenoj kaj fervojoj, pliigis produktajn specojn, akcelis la teknikan reformon al parto da mezaj kaj malgrandaj entreprenoj kaj vastigis la eksporton de iuj produktaĵoj. El tio gajnis konvenajn profitojn ankaŭ la fremdaj investintoj.

Fondo de entreprenoj per ĉina kaj alilandaj kapitaloj estas la ĉefa rimedo de Ĉinio por utiligi la fremdajn kapitalojn. Por vastigi internacian ekonomian kunlaboron kaj teknikan interŝanĝon, Ĉinio kun alilandaj kompanioj, entreprenoj aŭ individuoj fondis tiajn entreprenojn, laŭ la egalrajta kaj reciproke profitiga principo kaj laŭ la bezono de la ekonomia disvolviĝo de Ĉinio. Tiuj entreprenoj devas observi la ĉinajn leĝojn kaj obei la gvidon de la ĉina registaro. La Fujian-Japana Televidila Limigita Kompanio estas la unua entreprenoj en la ĉina elektrona industrio fondita per ĉina kaj japana kapitalo, la du flankoj posedas po duonon de ĝia kapitalo de 3.6 milionoj da janoj (= 1.8 milionoj da usonaj dolaroj). La kapitalo de la ĉina flanko estis parto de la fabrikaj

domoj, maŝinriparaj instalaĵoj kaj bonstatigaj instalaĵoj de la antaŭa Fujian-a Elektronika Fabriko, dum la kapitalo de la japana flanko estis avangardaj televidilaj produktolinioj kaj koncernaj kontrolaj instalaĵoj. Ĝiaj enkondukitaj tri televidilaj produktolinioj ĉiujare povas produkti 380 000 televidilojn. De junio de 1981, kiam ĝi komencis sian produktadon, ĝis la jarfino de 1982, tiu ĉi kompanio gajnis puran profiton de 476 400 juanoj.

Por akceli kaj subteni la disvolviĝon de tiaj entreprenoj, ĉiujare la ĉinaj aŭtoritatoj anoncis mildigi la koncernajn politikojn al la fremdlandaj investantoj. Ĉinio ne kolektas laŭenspezan imposton de tiuj entreprenoj en du jaroj post ilia fondiĝo, kaj kolektas de ili duonon de la laŭenspeza imposto en la tria jaro. Tio kreis kondiĉojn favorajn al ilia plua disvolviĝo.

RIMARKINDA EKONOMIA EFIKO

Forpasis nur mallonga tempo,

Haidi-restoracio de la hotelo Dongfang konstruita per fremdlanda kapitalo



de post kiam Ĉinio komencis utiligi alilandajn kapitalojn, tamen rimarkinda ekonomia efiko estas jam akirita.

Utiligante alilandajn kapitalojn Ĉinio kovris la malsufiĉon de la kapitaloj por enlanda konstruado, daŭrigis konstrui nombrojn da grandaj konstruaj objektoj ĉesigitaj pro ekonomia reguligo, akcelis energian kaj trafikan konstruadon, stabiligis la petrolan produktadon kaj rapidigis la prospektoradon kaj ekspluatadon de submara petrolo. 7 karbominejoj konstruitaj per fremdaj kapitaloj povas liveri karban produktokvanton de 20 milionoj da tunoj en la tempo de la Sesa Kvinjara Plano (1981 — 1985). La kvar ankrejoj de la du havenoj Shijiusuo de Shandong-provinco kaj Qinhuangdao de Hebei-provinco, kaj la du fervojoj Yanzhou-Shijiusuo-a kaj Pekino-Qinhuangdao-a estas rapide konstruataj per fremdaj kapitaloj. Laŭ takso, en 1985 ili povos pliigi la transportan povon por

eksportita karbo je 35 milionoj da tunoj.

Utiligante fremdajn kapitalojn Ĉinio rapidigis turisman disvolviĝon. En la lastaj 3 jaroj, Guangdong-provinco, kie abundas turismaj lokoj, konstruis kaj reformis hotelojn utiligante fremdajn kapitalojn de ĉ. 500 milionoj da usonaj dolaroj. Tio faris la turisman aferon de la provinco pli avangarda ol tiu de la aliaj provincoj en la lando. La granda hotelo Dongfang konstruita en la komenca periodo de la sesdekaj jaroj havis kompare postiĝintajn instalaĵojn kaj ne povis kontentigi la postulon de la turisma afero. En 1979 ĝi depruntis de banko kaj turisma kompanio de Hongkongo 30 milionojn da hongkongaj dolaroj por novigi siajn instalaĵojn. Post unu jaro la hotelo donis al la ŝtato profiton je 4 milionoj da juanoj, sin kvitiginte. Post reformo la hotelo havas modernajn instalaĵojn, kiaj aŭtomata centra klimatiza sistemo, telefona sistemo regata de komputiloj kaj aŭtomata fajro-alarma sistemo kun fumoskopoj. Ĝi estas hotelo ŝatata de fremdlandaj turistoj.

Utiligante fremdajn kapitalojn Ĉinio disvolvis novajn eksportajn produktaĵojn kaj trovis novajn eksterlandajn merkatojn. En la monda foiro de alkoholaĵoj, okazigita en 1981 en Bordo de Francio — la hejmloko de vino, la vino kun la marko “Dinastio”, produktita de la Vina Limigita Kompanio kune entreprenata de Ĉinio kaj Francio, faris sensacion en la publiko kaj fariĝis unu el la plej ŝatataj drinkaĵoj. Nun, la vino “Dinastio” estas vendata al Singapuro, Malajzio, Aŭstralio, Britio, Usono kaj Hongkongo kaj aliaj landoj kaj regionoj.

Utiligante fremdajn kapitalojn Ĉinio akcelis teknikajn reformojn. La instalaĵoj de la silkaj fabrikoj de Ŝanhajo antaŭe estis malnovaj kaj ne povis produkti altklasajn produktaĵojn. Por ŝanĝi tian staton, la Ŝanhaja Silk-industria Kompanio importis pli ol 900 diversajn silkaj-produktaĵajn instalaĵojn de ĉ. 15 milionoj da usonaj dolaroj, utiligante la rimedojn pri kompensa negoco kun fremdlandaj komercistoj kaj prilaborado de iliaj materialoj. Tiuj ĉi instalaĵoj plibonigis la kvaliton de la produktaĵoj kaj levis la ekonomian efikon. La Kvinna Silka Fabriko de Ŝanhajo antaŭe povis produkti nur ordinarajn kaj malaltklasajn silkaĵojn per siaj nekompletaj instalaĵoj. Sed ĝi kompletigis siajn instalaĵojn en tri jaroj dank' al utiligo de kompensa negoco kun fremdaj komercistoj. Nun la fabriko posedas kompare avangardajn teknikojn kaj instalaĵojn, per kiuj oni povas produkti ordinarajn kaj altklasajn silkaĵojn de pli ol 20 specoj, plenigis la vakantecon de iuj sferoj kaj povas gajni fremdajn valutojn de 14 milionoj da usonaj dolaroj ĉiujare. Ĝi donis modelan ekzemplon pri teknika reformo al la silkaj entreprenoj de Ŝanhajo.

Krome, utiligi fremdlandajn kapitalojn faris bonajn efikojn ankaŭ en vigligo de la enlandaj merkatoj kaj havigis al multaj urbanoj laborpostenojn.

BRILA PERSPEKTIVO

La praktiko en la lastaj jaroj pruvis, ke la rimedo utiligi fremdajn kapitalojn kaj avangardajn teknikojn bonefike akcelis la ekonomian konstruadon de Ĉinio.


La Tutlanda Laborkunveno pri Utiligo de Fremdaj Kapitaloj okazinta antaŭ nelonge en Pekino faris decidon, ke en la Sepa Kvinjara Plano Ĉinio daŭre efikoplene utiligos fremdajn kapitalojn. La rekta investo el fremdaj landoj havos pli grandan disvolviĝon. Kvankam en la Sesa Kvinjara Plano tia investo estas ankoraŭ ne granda, tio tamen malfermis vojon por tiu laboro en la Sepa Kvinjara Plano. La ĉina registaro jam prilaboris klaran politikon enkonduki fremdajn kapitalojn kaj teknikojn kaj aplikis iujn pli modernajn rimedojn. Krom grandnombra kontrakto pri ne-grandaj kunlaboroj, Ĉinio ankoraŭ aktive enkondukos fremdajn investojn al ĉefaj konstruaj objektoj.

En la estonteco Ĉinio enkondukos fremdajn investojn por ekspluati la naturajn fontojn kaj krome konstruos la entreprenojn kune administratajn de Ĉinio kaj aliaj landoj ĉefe en grandaj kaj mezgrandaj urboj precipe marbordaj kun bonaj kondiĉoj kaj oportuna trafiko. Ĉinio enkondukos teknikojn ne nur el kelkaj grandaj landoj, sed ankaŭ el aliaj landoj, inkluzive de disvolviĝantaj landoj. Krom la ordinaraj, Ĉinio aplikos ankaŭ pli multajn oportunajn rimedojn kaj formojn por enkonduki fremdajn teknikojn kaj instalaĵojn. Ankaŭ la internacie aplikata formo lue instalacion estos vaste utiligata de Ĉinio.

Nun, la koncernaj departementoj de Ĉinio estas en prilaborado de trijara plano por enkonduki 3 000 avangardajn teknikajn objektojn. Ĉinio lastatempe decidis daŭrigi la konstruadon de 8 grandaj kemi-industriaj entreprenoj, kies instalaĵoj de 2.4 miliardoj da usonaj dolaroj estis enkondukitaj el Japanio kaj FR Germanio en 1978. Ĉio ĉi tio montris, ke la ekonomia kunlaboro inter Ĉinio kaj aliaj landoj havas vastan perspektivon.

de **LI ZHAOFEN**

Parto de la Brakhorloĝa Fabriko de Tianjin, konstruita per fremdlanda kapitalo





HUANG WEIKANG:

Zhu Jianhua kreis novan mondan rekordon en altsalto

LA 11-an de junio 1983 iris en la Pekina Laborista Stadio la prepara atletika konkurso de la Kvina Tutlanda Sportkunveno.

En la sesa kaj kvin minutoj posttagmeze, sur la elektra poentotabulo okulfrape montriĝis alteco de 2.37 metroj. Tiam anoncisto ekparolis: "Zhu Jianhua, sportisto n-ro 173, provos rompi novan mondan rekordon!" Varmaj aplaŭdoj tuj ektondris tra la tuta sportejo.

Zhu Jianhua fikse rigardis momenton la horizontalan laton kaj aplombe mansignis al la juĝisto, ke li komencos salti.

"Silenton!" kriis la 80-jara ĉefjuĝisto Xia Xiang kun levitaj brakoj.

Tiam ĉesis vento, la suno sin kaŝis en nuboj kaj la aero kvaŝaŭ stagnis. Multaj fotiloj, televidaj kameraoj kaj sennombraj okuloj sin direktis al Zhu Jianhua.

Zhu Jianhua en blanka veŝto, ruĝa ŝorto, blankaj ŝtrumpetoj kaj kur-ŝuoj kutime ordigis sian hararon per la dekstra mano kaj profunde enspiris. Post mallongaj svingdonaj paŝoj li sin jetis al la lato. En la silenta sportejo klare aŭdiĝis la paŝbruo de Zhu. Antaŭ ol oni klare vidis liajn movojn, li jam transsaltis la laton.

La lato restis senmova. Zhu Jianhua fine rompis la mondan altsaltan rekordon de 2.36 metroj, kreitan de Gerd Wessig de la Germana Demokratia Respubliko la 1-an de aŭgusto, 1980 en Moskvo.

Sennombraj junuloj desaltis de spektejoj kaj kuris al Zhu Jianhua, kiu gajnis gloron por la patrolando, kaj alte levis lin.


Vicprezidanto de la Ĉina Atletika Asocio Xia Xiang, kiu sin okupis pri juĝado jam pli ol 50 jarojn, refoje kontrolis la laton kaj kur-ŝuojn de la altosalto Zhu, kaj post tio li solene deklaris: "La nova rekordo estas tute konforma al la koncer-

naj difinoj. Zhu meritas esti kreinto de la nova monda rekordo."

Tiutage la altosalto komenciĝis tridek minutojn post la tria. Kiam la lato leviĝis al la altecoj de 2 kaj 2.04 metroj, la provsaltojn partoprenis ĉiuj sportistoj escepte de Zhu Jianhua, kiu sidis flanke por ripozi. Nur kiam la lato leviĝis al la alteco de 2.08 metroj li komencis la provon kaj facile sukcesis en tio. Li facile transsaltis ankaŭ la altojn de 2.12 kaj 2.20 metroj, lasinte la altojn de 2.16 kaj 2.22 metroj ne provitaj por ŝparsi siajn fortojn.

La lato metiĝis ĉe la alteco de 2.26 metroj, kiu estas normo por partoprenantoj de A-grupo de la Monda Atletika Ĉampioneca Konkurso ĉi-jara. La juĝisto ŝanĝis la laton per alia. Ĉiuj altosaltoistoj malsukcesis escepte de Zhu, kiu donove facile sukcesis en la salto.

Tuj post tio Zhu Jianhua senhezite anoncis sin por transsalti



Ĉina sportisto Zhu Jianhua transsaltis 2.37-metran alton.

la altecon de 2.34 metroj. Sed kiam lia korpo jam sukcese transsaltis la laton, la lasta bedaŭrinde falis malrapide pro tuŝo de lia kalkanumo.

Zhu sentis deprimiĝon en la koro. Pasintjare en la Naŭa Azia Sportkunveno li ĝuste pro la sama kaŭzo perdis la ŝancon rompi la mondan rekordon. Antaŭ ol komenciĝis ĉi-foja konkurso, lia trejnisto Hu Hongfei atentigis lin: “Se aperos io simila, tio signifos, ke vi havas sufiĉe da forto, tiam nepre ne perdu bonŝancon rompi la mondan rekordon.” Rememorinte tion, li rapide kvietigis, iris al la juĝisto kaj firme diris: “Mi ne plu provos la altecon de 2.34 metroj, sed anstataŭe tiun de 2.37 metroj.”

Laŭ la reguloj de la konkurso tiukaze Zhu Jianhua havis nur du ŝancojn por provi la altecon. Sed tio neniom lin timigis. Fine li sukcesis.

Kiom da ŝvito elverŝis Zhu Jianhua por transsalti tiun altecon! En junio de 1980, kiam 17-jara Zhu Jianhua, lernanto de geknaba sporta lernejo, transsaltis la altecon de 2.25 metroj en la internacia atletika konkurso okazinta en Meksikio, li fariĝis multesperiga sportisto de Ĉinio. Je la 6-a de junio, 1981 li transsaltis la altecon de 2.30 metroj en Tokio kaj per tio rompis la azian rekordon tenitan de ĉina sportisto Ni Zhiqin dum 11 jaroj. Tiam la publiko jam antaŭdiris, ke li faros mirindaĵon por la nova atletika epoko de

Ĉinio. En julio de 1981 li grave vundis al si piedon en la finalo pri altsalto en la Monda Studenta Sportkunveno en Rumanio, kaj post tio li ripozis kelkajn monatojn. En la komenco de la pasinta jaro, li eĉ ne povis transsalti 2-metran alton, kaj pro tio li ĉagreniĝis kaj maltrankviliĝis. Liaj kolegoj kaj trejnisto lin konsolis kaj kuraĝigis. Dank’ al sia diligenta ekzercado li fine fariĝis la homo plej alte saltanta en la mondo.

Tiutage Zhu Jianhua diris al ĵurnalistoj: “Mi sukcese transsaltis la altecon de 2.37 metroj, tio jam fariĝis pasintaĵo. Mi ne fieros pro tio kaj klopodos por kiel eble plej baldaŭ transsalti la altecon de 2.40 metroj.”

Longzhou — Perlo ĉe la Suda Landlimo


de NONG XIUCHEN

LA gubernia urbo Longzhou de la Guangxi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono, starigita en 221 a. K., situas ĉe la supra baseno de Zuojiang-rivero kaj estas unu el la antikvaj urboj en suda Ĉinio.

Sin trovante en la subtropika zono, la loko estas ĉiam sub kareso de modera kaj humida klimato; la neĝo neniam trudiĝis tien, kaj la loĝantoj eĉ vintre ne bezonas vatitajn vestojn. Pro favoraj naturaj kondiĉoj tie

prosperas faŭno kaj flaŭro. Burretiodendro (*Burretiodendron hsienmu*) estas unu el la valoraj arbo-specoj propraj al la loko kaj liveras malmolan kaj delikatan lignon al farado de ŝipoj, haktabuloj kaj altkvalitaj me-


Pejzaĝo en Longzhou




Pejzaĝoj de Longzhou

Fotoj de HAI FENG

Remado sur akvorezervejo





La Vira kaj Virina Montoj en malproksimo





Montpintoj en matenruĝo

Fresko sur la roko Huashan




Parko



Melodio de la lumo

de RIGHI CLAUDIO

(Italio)



Kokidaĵo kun fungoj



bloj. En la naturparko Longgang en la gubernio kreskas "Reĝo de Buretiodendroj" kun diametro de ĉirkaŭ 3 metroj.

Groteskaj montpintoj kaj rokoj, kristalaj lagoj kaj riveretoj ambaŭborde plenaj de verdaj bambuaroj karakterizas la ok famajn naturajn vidindaĵojn de Longzhou, kiuj troviĝas en aŭ ekster la urbo kaj interkomunikiĝas kvazaŭ granda ĝardeno.

"Liuto-ludo far Blanka Ĉevalo", unu el la ok vidindaĵoj, estas ĉe Zuojiang-rivero sude de la urbo, kie ombras maljunaj arboj kaj imponas krutaj rokoj. Sur la apudrivera deklivo staras la arkitekture originala kaj bele ornamita Fubo-templo, akompanata de antikva pagodo, sur kiu oni povas rigardi la ĉarman riveron. Proksime al la rivero sub la klifo troviĝas profunda lageto, nomata "Fubo-lageto", el kiu aŭdiĝas tintado de liuto.

Legendo diras, ke en la Orienta Han-dinastio (25—220 p.

K.), kiam fremduloj atakis la landliman regionon, Ma Yuan, titolita "Fubo-generalo", gvidis ekspedicion suden laŭ la ordono de la imperiestro por defendi la patrujon. Post sia venko li restis garnizone ĉe Longzhou kaj starigis tendaron sur la suda bordo de Zuojiang-rivero. Li havis blankan ĉevalon, kiun oni trinkigis ĉe la rivero matene kaj vespere. Foje okazis, ke la ĉevalo falis en la lagan abismon, kaj de post tio aŭdiĝis el ĝi agrabla tintado, ĉar tie, oni diris, la ĉevalo ludas muzikilon. En la jaro 1643 la landlimaj loĝantoj speciale konstruis la templon ĉe la lageto memore al Fubo-generalo, kiu estis meritoplena en la nacidefendo. La templo nun servas al turistoj kiel ripozejo, de kie ili povas rigardi la lageton kaj aŭskulti la misteran tintadon.

Se oni de tie iras al la supra parto ĉirkaŭ 300 paŝojn laŭ Zuojiang-rivero, antaŭ ili aperas alia vidindaĵo — "Du Drakoj en

Konkurado pri Perlo". Tie ĉirkaŭ sablaĵo kun areo de 15-ono da hektaro kunfluas la smeralda rivero Shuikou, kiu torentas el profundaj ravinoj, kaj la ruĝflava rivero Ping'er. Plaŭdas la akvo ĉe la kunfluejo, kvazaŭ du malsamkoloraj drakoj konkurus inter si pri "perlo" — la sablaĵo. En la okcidenta direkto staras du grandaj montoj unu apud alia, kiuj, rigardate de malproksime, similas al — kiel oni ilin nomas — "Du Feniksoj Rigardantaj al la Suno". Tamen, proksimiĝinte al ili, oni trovas, ke ili aspektas ankaŭ kiel paro da geviroj, kaj tial la lokanoj ilin nomas ankaŭ "Geviraj Montoj".

Irinte okcidenten je 1.5 km. laŭ la piedoj de la montoj, oni sin trovas antaŭ Xiaolian-murego, kiun la landlima generalo Su Yuanchun konstruigis kontraŭ la eventualaj invadoj de fremdlandaj malamikoj en 1887. La murego, kelkajn metrojn alta kaj masonita el grandaj ŝtonoj, etendiĝas plurajn kilometrojn sur la kresto de la impona monto Jiangshan. Ekipita per barbedoj kaj municiejo, la murego estis nerompebla por la invadantoj siatempe.

Ĉe la talio de la monto Jiangshan troviĝas Longyuan-kaverno, en kiu estas "Baoyuan-palaco". Pli ol 350 ŝtupoj ligas la kavernon kun la montpiedo, tamen la grimpantoj povas halti survoje ĉe kiosko por reakiri spiron. Sur ebena tereno antaŭ la kaverno staras domoj ĉirkaŭitaj per malalta muro. La kaverno ampleksas areon de ĉirkaŭ 1/15 hektaro, kaj interne videblas la statuoj de kvar ĉielaj reĝoj kaj ok feoj. Koridoro dekoraciita per delikataj lignaj skulptaĵoj kondukas al la malantaŭo de la

Kokidaĵo kun fungoj

Materialoj:

Kokido	1
Sekaj fungoj (trempitaj en akvo)	100 g.
Tranĉita ŝinko	50 g.
Rizvino	25 g.
Salo	10 g.
Ŝenoprazaj kaj zingibraj pecoj	25 g.
Supo sen viando	750 g.

Preparado:

1. Sentripigu kaj lavu la kokidon. Distranĉu ĝin laŭ ĝia dorso. Poĉu ĝin en poto kun bolanta akvo dek minutojn kaj forigi la sangŝaŭmon.

2. Metu la kokidon en supujon kun supo, fungoj, ŝinkopecetoj, ŝenoprazaj kaj zingibraj pecoj, rizvino kaj salo. Fermu hermetike la supujon per celofano kaj vaporumu ĝin ĉ. unu horon. Kaj tiam la plado estas preta.



Reĝo de bureti dendroj

kaverno, kie vidiĝas ekrana muro kun kolore kaj reliefe desegnitaj montoj, riveroj, floroj, birdoj kaj bestoj. Ambaŭflanke de la ekrana muro troviĝas po unu pordo, tra kiu oni povas iri en la "Internan Halon" — alian parton de la kaverno, kiun klare lumigas fasko da lumo penetranta tra truoj en la plafono. Tie, laŭdire, la generalo Su Yuanchun loĝis kaj faris strategiajn planojn siatempe.

Se oni daŭrigas sian suprengrimpadon de la kaverno kaj preterpasas Zouma — pavilonon, ili venas antaŭ alian ekranan muron je 7 metroj larĝan

kaj je pli ol 2 metroj altan, kun pli grandioza reliefo. De tie, per kelkcent paŝoj, oni povas atingi la barbedon sur la montpinto.

Turistoj, se ili volas, povas ankaŭ veturi per plezurboato sur Zuojiang-rivero por rigardi la famajn freskojn sur la rokmuroj de la monto Huashan.

Kiam la boato malrapide iras laŭflue, ĉe ĝiaj ambaŭ flankoj oni povas vidi fiŝojn naĝantaj en la spegule klara akvo, kiu jen kaj jen krispiĝas kaj briletas sub la blovado de milda vento. Laŭlonge de ambaŭ bordoj viciĝas belaj montoj, ĉiu en sia aparta

pozo. Post ĉirkaŭ unu horo la boato venas en la popolan komunumon Xiangshui kaj sin trovas antaŭ unu el la plej grandaj freskoj en la gubernio — la roka fresko de Mianjiang. Jen, el la rivero abrupte leviĝas ĉielskrapa rokmuro, sur kiu, je ĉirkaŭ 70 metroj super la akvo, estas ruĝbrune pentritaj pli ol cent homfiguroj ĉirkaŭ du metrojn altaj. La figuroj supervivis la longan naturan erozion en la pasintaj jaroj kaj restas klare distingeblaj. Ili, aŭ svingantaj batalilojn, aŭ pugnantaj, aŭ frapantaj milit-tamburojn, aŭ hurraantaj, aspektas bravaj kaj heroecaj. La tuta pentraĵo, farita per fortaj strekoj, karakteriziĝas per harmonio kaj delikateco kaj montras, ke la Ĝuang-nacieca popolo, kiu de longe tie loĝis, lertis en pentrarto. Laŭlonge de la 60-kilometra parto de Zuojiang-rivero troviĝas entute ĉirkaŭ 20 tiaj freskaroj, el kiuj la plej grandioza estas la roka fresko de Balai en la gubernio Ningming. Tiu fresko estas pentrita sur rokmuro pli ol 170 metrojn larĝa, kun ĉirkaŭ 1 300 homfiguroj, inter kiuj unu altas je pli ol 4 metroj. Ĝis nun neniu povis konstati, al kiu dinastio apartenis tiu granda fresko kaj kiu ĝin pentris, sed tiu pentraĵo elokvente atestas la saĝon kaj kapablon de la antikva Ĝuang-nacieca popolo kaj altiras al si multe da fervoraj vizitantoj.



20 sanprotektaj ekzercoj (2)

DEKUNUA EKZERCO

Komenca teniĝo: Rekte stari kun la piedoj disigitaj iom pli larĝe ol la ŝultroj kaj kun la brakoj mallevitaj.

Farado: Ĉiuj ekzercoj devas esti farataj 6-36-foje. 1. Etendi la maldekstran brakon antaŭen kaj retiri la maldekstran manon al la maldekstra flanko de la talio; etendi antaŭen la dekstran manon (kvazaŭ glavon en objekton), turni la korpon maldekstren, fleksi antaŭen la maldekstran gambon kaj klini la dekstran sen levi la kalkanon. 2. Fari la samon kiel ĉe 1 en la inversa direkto. Sekvi la etendi-

tan manon per la rigardo. Antaŭenmovi la brakon iom forte por streĉi la koksajn muskolojn.

DEKDUA EKZERCO

Komenca teniĝo: Rekte stari kun la piedoj disigitaj kaj la brakoj krucitaj antaŭ la ventro.

Farado: 1. Kurbigi la korpon, rigardi la manojn, levi la supran parton de la korpo kaj levi la krucitajn brakojn ĝis super la kapo kvazaŭ suprengrimpante ion, laŭeble streĉi la muskolojn kaj rektigi la korpon. 2. Mallevi la brakojn ambaŭflanken kaj preni denove la komenca teniĝon. Direkti la okulojn foje al


la maldekstra mano, foje al la dekstra.

DEKTRIA EKZERCO


Komenca teniĝo: Kiel ĉe la dekunua ekzerco.

Farado: 1. Kurbigi la supran parton de la korpo, iom fleksi la genuojn, levi la maldekstran brakon supren kaj maldekstren kaj turni la kapon laŭe, sekvi la maldekstran manon per la rigardo kaj malforte premi la maldekstran genuon per la dekstra mano. 2. Fari la samon kiel ĉe 1 en la inversa direkto. Enspiri dum la turnado de la kapo kaj


Dekunua ekzerco




Dekdua ekzerco




Dektria ekzerco



Dekkvara ekzerco



Dekkvina ekzerco



elspiri dum la returnado. La kapoturnado devas esti neforta, la brakolevado malrapida kaj la manprenado de la genuoj milda.

DEKKVARA EKZERCO

Komenca teniĝo: Rekte stari kun la kurbigitaj brakoj ĉe ambaŭ flankoj de la talio.

Farado: 1. Turni la piedojn maldekstren, fleksi la genuojn, tuŝi la maldekstran suron per la dekstra genuo, pugnigi la maldekstran manon ĉe la talio, turni maldekstren la dekstran pugnon ĉe la talio kaj la supran parton de la korpo, etendi maldekstren la dekstran brakon kaj teni ĝin en horizontala pozicio. 2. Fari la samon kiel ĉe 1 en la inversa direkto. La turnado devas esti malrapida kaj stabila kaj spirado natura.

DEKKVINA EKZERCO

Komenca teniĝo: Kiel ĉe la dekunua ekzerco.



Farado: 1. Pugnigi la maldekstran manon ĉe la talio, movi maldekstren la etenditan dekstran manon, turni maldekstren

la maldekstran piedpinton kaj la supran parton de la korpo samtempe kun la movo de la dekstra mano. 2. Platigi la maldekstran pugnon, etendi ĝin maldekstren, movi la manojn unue supren, poste dekstren kaj poste duoncirkle al la tero antaŭ la korpo; denove pugnigi la maldekstran manon ĉe la talio kaj denove etendi la dekstran manon; direkti la manojn supren, dekstren, antaŭen kaj maldekstren, dume klini la supran parton de la korpo malantaŭen, dekstren, malsupren kaj maldekstren respektive; denove pugnigi la maldekstran manon ĉe la talio kaj movi maldekstren la supran parton de la korpo. Turni ĝin sinsekve dufoje. 3. Pugnigi la dekstran manon ĉe la talio, etendi la platigitan maldekstran pugnon, movi ĝin dekstren kaj turni dekstren la dekstran piedpinton kaj la supran parton de la korpo samtempe kun la movo de la maldekstra mano. 4. Fari la samon kiel ĉe 2 en la inversa direkto. Alterne movi la manojn ĉe ĉiu spiro. Fari la movojn malrapide, sekvi la manojn per la okuloj kaj rekte stari sen flekso de la genuoj.

Deksesa ekzerco

Deksepa ekzerco

Dekoka ekzerco



DEKSESA EKZERCO

Komenca teniĝo: Rekte stari kun la piedoj disigitaj iom pli larĝe ol la ŝultroj kaj kun la manoj sur la koksoj.

Farado: 1. Fleksi la maldekstran genuon kaj rektigi la dekstran gambon. 2. Repreni la komenca teniĝon. 3. Fleksi la dekstran genuon kaj rektigi la maldekstran gambon. 4. Repreni la komenca teniĝon. Rektigi la korpon, direkti la okulojn antaŭen, firme stari sur la piedoj, fari genuflekson ne tro malalten, fari la movojn ne tro rapide. Enspiri dum la genuflekso kaj elspiri dum la repreno de la komenca teniĝo.

DEKSEPA EKZERCO

Komenca teniĝo: Rektigi la talion, iom fleksi la genuojn kaj iom klini la korpon antaŭen, masaĝi unue la genuojn kaj poste premi la lokojn iom supre de la genuoj kaj fikse rigardi mal-supren antaŭ la korpo.

Farado: Rotacie turni la genuojn de maldekstre antaŭen, dekstren kaj malantaŭen. Post kelka ekzercado inverse fari la samon de dekstre antaŭen, mal-

dekstren kaj malantaŭen. Dum la farado stari sur la piedoj firme, premi la genuojn ne tro forte kaj teni la kapon ne tro malalte. Fari unu rotacian turnadon ĉe ĉiu spiro kaj tion ripeti pli kaj pli grandsvinge.

DEKOKA EKZERCO

Komenca teniĝo: Rekte stari kun la piedoj disigitaj, kiom la ŝultroj etendiĝas, kaj pugnigi la manojn ĉe la talio.

Farado: 1. Sidiĝi kaŭre, laŭeble tuŝi la kalkanojn per la postajo, platigi la pugnitajn manojn, horizontale etendi la brakojn. 2. Stariĝi kaj preni denove la komenca teniĝon. Fari enspiron dum la kaŭriĝo kaj elspiron dum la stariĝo. Fari la kaŭriĝon tiom malalte kaj je tiom da fojoj, kiom laŭeble; rektigi la supran parton de la korpo sen ia ajn kliniĝo.

DEKNAŬA EKZERCO

Komenca teniĝo: Rekte stari kun la gamboj kunigitaj kaj kun la manoj sur la koksoj.


Farado: 1. Levi la maldekstran femuron horizontale kaj la kruron vertikale, ĵeti antaŭen la maldekstran piedon, kun la pi-

edpinto rektigita kaj la pieddorso streĉita. 2. Mallevi la maldekstran piedon surteren, levi la dekstran gambon kaj ĵeti antaŭen la dekstran piedon kiel ĉe 1. 3. Mallevi la dekstran piedon surteren kaj ĵeti malantaŭen la maldekstran piedon, ke la kalkano tuŝu la kokson. 4. Mallevi la maldekstran piedon surteren kaj ĵeti malantaŭen la dekstran piedon. 5. Mallevi la dekstran piedon surteren kaj ĵeti la maldekstran piedon internen kun la interna maleolo supren. 6. Mallevi la maldekstran piedon surteren kaj ĵeti la dekstran piedon internen kun la interna maleolo supren. 7. Mallevi la dekstran piedon surteren, levi la maldekstran piedon kaj ĵeti ĝin eksteren kun la ekstera maleolo supren. 8. Mallevi la maldekstran piedon surteren kaj ĵeti la dekstran piedon eksteren kun la ekstera maleolo supren.

La supraj ok movoj dividiĝas en kvar grupojn por ekzercado, t.e. unue ekzerci ok-foje la movojn 1, 2, poste 3, 4, poste 5, 6 kaj laste 7, 8. Ĵeti la piedojn antaŭen, internen kaj eksteren ĝis horizontala pozicio. Fari enspiron dum la ĵetado de la piedoj

Deknaŭa ekzerco

Dudeka ekzerco




kaj elspiron dum la mallevo de la piedoj. Ne forte fari la piedeton, teni rekta la supran parton de la korpo, direkti la okulojn antaŭen kaj ne mallevi la kapon.

DUDEKA EKZERCO

Komenca teniĝo: Rekte stari kun la manoj sur la koksoj.

Farado: 1. Movi antaŭen la maldekstran piedon je unu paŝo, kun la kalkano tuŝanta la teron unue. 2. Movi antaŭen la dekstran piedon je unu paŝo, turni la korpan graviton sur la dekstran piedon kaj levi la maldekstran kalkanon. 3. Movi malantaŭen la dekstran piedon je unu paŝo, kun la piedpinto sur la tero, turni la korpan graviton sur la dekstran kalkanon kaj levi la maldekstran piedpinton kun la kalkano sur la tero. 4. Mallevi la maldekstran piedpinton surteren, movi antaŭen la dekstran piedon je unu paŝo kaj ankaŭ la maldekstran kun la piedpinto sur la tero. 5. Movi malantaŭen la maldekstran piedon je unu paŝo, kun la piedpinto sur la tero, turni la korpan graviton sur la maldekstran piedon kaj levi la dekstran piedpinton. Fari unu spiron ĉe ĉiu piedmovo antaŭen aŭ malantaŭen, rektigi la supran parton de la korpo kaj rigardi antaŭen aŭ antaŭen kaj malsupren. Levi la piedpintojn kaj la kalkanojn laŭeble por streĉi la krurajn muskolojn kaj kalkanan tendenon.



LI PING:

PU SONGLING KAJ LIA "NOTOJ PRI STRANGAĴOJ DE LIAŬĜAJ"

"Notoj pri Strangaĵoj de Liaŭĝaj" de Pu Songling (1640-1715 p. K.) estas fama novelaro en la literatura historio de Ĉinio. La novelaro estis multe ŝatata de la ĉinaj legantoj. En la kuranta jarcento multaj noveloj el tiu ĉi verkaro estis tradukitaj en plurajn lingvojn kaj ĝuis reputacion en la mondaj literaturaj rondoj.

La novelaro priskribis de diversaj flankoj la vivon, morojn, kutimojn kaj psikon de la ĉina feŭdisma socio. Ĝi povas esti dividita en tri kategoriojn: Unue, ĝi kritikis la malluman feŭdisman politikon. Per siaj vivecaj rakontoj la verkisto prezentis, ke la feŭdisma socio estis maljusta mondo favora al potenculoj kaj riĉuloj. Due, ĝi malkaŝis diversajn malbonojn de la kortega ekzamena sistemo por nomumi altrangajn oficistojn. Pu Songling senkompate vipis koruptajn inspektorojn kaj kontraŭleĝajn farojn en nomumado de oficistoj kaj donis profundan simpatian al la kandidatoj malsukcesintaj en kortega ekzameno. Trie, la plejparto de la novelaro estis rakontoj pri amo inter gejunuloj. La verkisto malkaŝis diversajn malbonajn fenomenojn

de la feŭdisma edziĝa sistemo kaj prikantis la gejunulojn aspirantajn al pura amo kaj feliĉa vivo.


La novelaro prezentis la socian realon plejparte per vulpaj kaj diablaj figuroj, t.e. frapis mallumajn fortojn en realo pere de superrealaj fortoj por laŭdi la justaĵojn. La verkisto diris, ke "Notoj pri Strangaĵoj de Liaŭĝaj" estas libro por esprimi lian indignon.

La novelaro havas grandan artan infektivon pro siaj vivecaj kaj figura priskribo, striktaj kaj variaj intrigoj, strukturo kaj klaraj lingvaĵoj.

En la novelaro la verkisto sukcese modlis multnombrajn virinojn transformitajn el vulpoj, fantomoj kaj elfoj. La vulpoj, fantomoj kaj elfoj en la rakontoj havas homajn aspekton kaj karakterojn kaj samtempe malsamgrade superhoman povon. La verkisto lerte priskribis la trajton de la herooj per koncizaj lingvaĵoj, la de li priskribitaj aspektoj de la herooj bone prezentis ilian spiritan mondon kaj la de li donitaj medio kaj intrigaj detalajoj figure reliefigis iliajn karakterojn, tial la herooj

en liaj noveloj neforgeseble impresis la legantojn. La ĉina fame konata moderna verkisto Lusin diris: “«Notoj pri Strangajoj de Liaŭĝaj» prezentis ordinarajn personojn per delikata priskribo, donis homan spiriton al elfoj, vulpoj kaj fantomoj, tiel ke la legantoj sentas ilin afablaj kaj intimaj kaj ne prenas ilin kiel eksterhomajn estaĵojn, sed fine trovis ilin ne homoj pro iliaj iuj neordinaraĵoj.”

Pu Songling naskiĝis en etkomercista kaj etbienula familio de Zichuan (la nuna Zibo) de Shandong-provinco en 1640. Li lernis bone en sia infanaĝo kaj famiĝis en la aĝo de 19 jaroj en lia hejmloko pro brila sukceso en ekzameno. Sed en la postaj ekzamenoj li malsukcesis fojon post fojo kaj nur en la aĝo de 71 jaroj li sukcesis trapasi la mezgradan ekzamenon. La senĉesa malsukceso en ekzameno grave influis al li. Ĉar lia talento longe restis neglektita, li povis klare vidi la diversajn putrajn fenomenojn de la kortega ekzamina sistemo. Kaj ĉar li neniam eniris en la vicaron de altranguloj kaj vivis modeste kiel vilaĝa instruisto, li povis koni mizeran vivon de kamparanoj kaj iom post iom koni la mallumon de la feŭdisma socio. Li pasigis sian infanan tempon en militaj jaroj kaj travivis la ŝanĝon de la du dinastioj Ming kaj Qing. Li vivis en la periodo, en kiu la sociaj kontraŭdiroj estis tre akraj, la ekonomia ekspluatado ĉiam pli peza kaj la ideologia regado tre rigora. Tial liaj verkoj prezentis ne nur lian personan malkontenton, sed certgrade spegulis la malluman socion kaj la deziron de la popolo. Ĝuste pro tio la novelaro havas profundan simpatian al la popolo.



Loĝejo de Pu Songling

Pu Songling ĉiam vivis inter la popolo kaj tre ŝatis kolekti folklorojn. Liaj verkoj spiras fortan vivetoson. Oni diris, ke en la jaroj kiam li verkis la novelaron “Notoj pri Strangajoj de Liaŭĝaj”, li starigis te-budon apud vojo por preterpasantoj, ĉiu preteriranto povis trinki senpage, sed tiu devis rakonti al li unu rakonton. Ankaŭ liaj amikoj registris aŭditajn rakontojn kaj sendis ilin al li. Li ĉiamaniere kolektis rakontojn pri fantomoj, vulpoj kaj demonoj cirkulantajn en diversaj lokoj. Prenante tiujn kolektitajn rakontojn kiel skeleton, li plenumis la novelaron “Notoj pri Strangaĝoj de Liaŭĝaj”.

Pu Songling verkis ses volumojn da poemoj, kvar volumojn da artikoloj, 14 folklorajn ariojn kaj unu romanon. “Notoj pri Strangajoj de Liaŭĝaj” estis lia ĉefverko, kiu inkluzivas pli ol 490 novelojn.

“Qingfeng” aperigita en tiu ĉi numero de EPĈ estas fame konata verkaĵo el la noveloj. Ĝi priskribis amon inter junulo Geng Qubing kaj vulpknabino Qingfeng. La novelo brile modlis malsamajn karakterojn de la herooj. La verkisto vivigis la personojn per malmulta priskribo, tiel ke eĉ post fermo de la libro la legantoj estas ankoraŭ remaĉantaj la intrigojn.

QINGFENG

(Klasika Novelo)

GENG-FAMILIO en la urbo Taiyuan iam estis fame riĉa kaj havis vastegan loĝejon. Poste ĝi dekadencis kaj la belaj konstruaĵoj kadukiĝis plejparte. Sekve la domo ekestis vizitata de fantomoj: la pordoj ofte malfermiĝis aŭ fermiĝis per si mem, kaj la domanaro ofte tumultiĝis noktomeze vekiginte de teruro. La mastro ne povis tion toleri kaj transloĝiĝis en vilaon, konfidante la loĝejon al maljuna pordisto. De tiam la domo fariĝis pli dezerta. Tamen en la domo oni povis aŭdi parolojn, ridojn, kantadon kaj muzikon.

La mastro havis nevon Geng Qubing, kiu kondukis spiteme kaj brave. Li petis la maljunan pordiston, ke li tuj raportu al li, se li vidis aŭ aŭdis ion mirindan en la loĝejo.

Iunokte, vidinte flagrantan lamplumon en ĉambro de la dua etaĝo, la pordisto senprokraste raportis tion al Geng Qubing. La junulo volis tuj eniri en la domon por esplori la strangajn. Spite malkonsilon de la maljunulo, Qubing ekiris tien. Pro ke li bone konis la vojojn en la loĝejo, li alproksimiĝis, malfermante al si vojon tra artemiziaj arbustoj. Ascendinte la supran etaĝon, li trovis nenion strangan. Trapasante ĉambrojn, li aŭdis interparolon. Li kaŝe observis kaj vidis paron da grandaj kandeloj hele prilumantaj la ĉambron. Maljunulo en intelektula ĉapo sidis vizaĝe al la sudo,

kaj kontraŭ li sidis maljunulino. Ambaŭ aspektis kiel kvardekjaruloj. 19-jara junulo sidis oriente de la tablo kaj 15-jara junulino transe de ĝi. Ili gaje babilis ĉirkaŭ la tablo plene kovrita per pladoj kaj vinoj. Geng Qubing subite entrudiĝis en la ĉambron kaj ridante kriis: "Jen gasto neinvitita!" La du virinoj kaj junulo forkuris timigite. Poste la maljunulo demandis riproĉe: "Kiu entrudiĝas en alies buduaron?" Geng diris: "Tiu estas loĝejo de mia familio kaj nun vi okupis ĝin. Ĉu ne estas tro avare, ke vi ĝuas bonan vinon, sen inviti la mastron de la domo?" La maljunulo pririgardis lin kaj neis: "Vi ne estas la mastro." Geng diris: "Mi estas spitema junulo Geng Qubing, nevo de la mastro." La maljunulo tuj salutis respektoplene: "Antaŭ longe mi jam informiĝis pri via famo." Sekve, li invitis Geng altabliĝi kaj ordonis ŝanĝi la pladojn. Geng haltigis lin, tiu do proponis al li vinon. Geng diris: "Ni estas intimaj amikoj, kaj ne devas foresti la ĵusaj ĉeestantoj. Estas pli bone, ke ili revenu al la tablo." La maljunulo vokis: "Xiao'er!" Baldaŭ eniris la junulo. La maljunulo diris: "Li estas mia filo." Salutinte, la junulo sidiĝis. Geng demandis pri ilia familio. La maljunulo diris: "Mi nomiĝas Hu Yijun." Geng kondukis tre senĝene kaj parolis humure. Ankaŭ Xiao'er parolis libere. En intima babilado ili fariĝis amikoj. Geng Qubing estis 21-jara, du

jarajn pli aĝa ol Xiao'er, tial ili amikiĝis kiel fratoj. La maljunulo diris: "Mi aŭdis, ke via prapatro kompilis krombiografion de Tushan-familio. Ĉu vi scias pri tio?" Geng jesis. La maljunulo diris plu: "Mi estas posteulo de Tushan-familio. La genealogion post Tang-dinastio mi ankoraŭ memoras, sed tiun antaŭ tiu tempo mi ne konis. Bonvolu konigi tion al ni." Geng Qubing koncize sed tre vivece rakontis, kiel Tushan edziniĝis sian filinon al la reĝo Yu kaj kiel lia filino helpis Yu en bridado de diluvo. La maljunulo aŭskultis ĝoje kaj diris al la filo: "Hodiaŭ mi feliĉe aŭskultis multon kion mi antaŭe ne aŭdis. Lia moŝto ne estas fremdulo, vi venigu viajn panjon kaj kuzinon, por ke ankaŭ ili konu la meritojn de niaj prapatroj." Xiao'er stariĝis kaj iris post la kurtenon. Baldaŭ reaperis la maljunulino kaj la knabino. Geng avide pririgardis la knabinon. Ŝi estis svelta kaj la grandaj okuloj brile radiis saĝecon. Tiel ĉarman belulinon oni ne povas trovi aliloke en la homa mondo. Montrante la maljunulinon la maljunulo diris: "Ŝi estas mia edzino." Montrante la knabinon li diris: "Ŝi estas mia nevino kaj nomiĝas Qingfeng. Ŝi estas saĝa kaj povas memori, kion ŝi vidis kaj aŭdis. Tial mi alvokis ŝin por aŭskulti vian rakontadon." Trinkante vinon post rakontado, Geng fiksitis sian rigardon sur Qingfeng eĉ ne palpebrumante.

La Berlina Kordinstrumenta Kvarteto en Pekino

Fotoj de YE RUIFU



Luo Jun, vicedestro de la Ĉina Komitato por Kultura Interfluo kun Fremdaj Landoj, gratulas la artistojn.


La Berlina Kordinstrumenta Kvarteto de DDR ĝuas grandan famon en la mondo. Lastatempe ili faris belan prezentadon en Pekino kaj ricevis varman aplaŭdon. Tie ili ankaŭ ekskursis al vidindejoj.

En ludado






La estro de la kvarteto s-ro Wolf-Dieter Batzdorf parolas en la bankedo aranĝita de Ĉinio honore al la gastoj.



En la Longa Koridoro de la Somera Palaco

Sur la Granda Muro



La Pantomima Trupo de Ladislav Fialka en Ĉinio

Fotoj de LAO BAI

Lastatempe la Pantomima Trupo de Ladislav Fialka de Ĉeĥoslovakio vizitis Pekinon kaj estis varme akceptata de ĉinaj rigardantoj. Dum sia vizitado la trupo kunsidis kun ĉinaj kolegoj por interŝanĝi spertojn kaj ekskursis al famaj pitoreskejoj.

En prezentado




Lü Zhixian, vicestro de la Kultura Ministerio de Ĉinio, kaj aliaj gratulas la artistojn pro ilia sukcesa prezentado.





Vizito al la lamaisma templo Yonghegong



La gastoj interesiĝas pri ĉinaj historiaj objektoj.

Ĉeĥoslovakaj kaj ĉinaj artistoj interŝanĝas spertojn.



Tion rimarkinte, Qingfeng mallevis la kapon. Geng kaŝe surtretis ŝian piedon per la sia, la knabino haste retiris sian piedon, sed mienis senkolere. Geng ekstaziĝis, ne povis teni sin de la ardo kaj diris frapante la tablon: “Havante tian knabinon kiel edzinon, mi volonte rezignus reĝecon.” Vidante Geng iom ebria kaj pli malsobra, la patrino kaj la knabino levigis kaj iris post la kurtenon. Geng malesperis kaj eliris, adiaŭinte la maljunulon. Sed li ĉiam sopiris la knabinon, kvazaŭ la koro estus forprenita de ŝi.

En la sekvanta nokto, Geng refoje iris al la loko. La kutima aromo ankoraŭ povis esti flarita en la ĉambro. Li atendis tutan nokton, sed aŭskultis nenian sonon. Reveninte, li konsiliĝis kun la edzino, dezirante transloĝigi la tutan familion tien por revidi Qingfeng. La edzino malkonsentis tion. Geng do mem iris tien kaj legis libron en la teretaĝo. Nokte, kiam li komencis ripozi ĉe tablo, englitis diablo kun pendanta hararo kaj nigra vizaĝo, rigardante vidalvide al li. Geng ridis, trempis sian fingron en tuĉfrotujo, nigrigis sian vizaĝon kaj poste fiksis sian rigardon sur la diablo. La diablo hontis kaj foriris. En la sekvanta noktomezo, iom pli malfrue, kiam li estingis la kandelon kaj pretis enlitiĝi, li aŭdis bruon de malriglado de la pordo de la malantaŭa pavilono. Li haste iris subrigardi kaj trovis la pordon duone malfermita. Baldaŭ aŭdiĝis trotado kaj eliĝis el la pavilono lumo de kandelo. Li atente rigardis kaj rekonis en la venanto Qingfeng. En subita renkontiĝo kun Geng, ŝi retiriĝis de timo kaj fermis la pordon. Geng genuiĝis petante: “Mi venis riske nur por renkonti vin.



Feliĉe estas, ke ĉi tie nun estas nur ni ambaŭ, kaj premi vian manon estas por mi ĝojo, post tio mi ne bedaŭros la morton.” Qingfeng diris: “Mi ja konsciis vian fortan amon al mi. Sed mia onklo havas rigoran familian disciplinon, kaj mi ne kuraĝas konsenti vian peton.” Geng petegis: “Mi ne kuraĝas kuntuŝi kun via korpo, revidi vin jam estas granda kontento por mi.” La knabino ŝajne konsentis kaj eliris, malriglante la pordon. Geng tre ĝojis kaj kaptis ŝin je la brako, kondukis ŝin al la mal-supra ĉambro kaj ĉirkaŭprenis ŝin kaj sidigis ŝin sur siaj genuoj. Qingfeng diris: “Nia renkontiĝo estas destinita. Post tiu nokto via sopiro restos senfrukta.” “Kial?” “Via senbrideco

malplaĉas al mia onklo, tial li prenis diablan formon por fortimigi vin, sed vi tion ne timis. Mia onklo trovis alian loĝejon, ili nun transportis la havaĵon al la nova loĝejo kaj restigis min ĉi tie por gardi la restaĵon. Ankaŭ mi foriros morgaŭ.” Tion dirinte, ŝi volis foriri, dirante: “Mi timas, ke la onklo revenos.” Geng perforte haltigis ŝin kaj montris fortan seksurĝon. Dum rifuzado envenis subite la maljunulo. La knabino konsterniĝis de timo kaj honto. Ŝi apogis sin sur la lito kun klinita kapo, subkonscie tordadis la rubandon de la vesto. La maljunulo diris kolere: “Vi, frivola, malglorismian familion! Tuj foriru, alie mi vipos vin solide!” Qingfeng haste foriris kun mallevita kapo

kaj ankaŭ la maljunulo foriris. Geng sekvis ilin kaj aŭdis senĉesan riproĉon de la maljunulo kaj ploradon de Qingfeng. Li kordoloris kaj kriis laŭte: "La kulpo estas mia. Kial kulpigi Qingfeng? Se vi indulgos ŝin, mi volonte akceptos ajnan punon, eĉ segi aŭ haki min!" Poste ĉio silentiĝis kaj Geng revenis dormi. De tiam ne plu aŭdiĝis sonoj kaj bruoj en la domo. Tion aŭdinte, la onklo de Geng Qubing estis forte mirigita kaj volontis vendi al li la loĝejon je prezo favora al li. Geng ĝojis kaj transloĝiĝis en la domon. Li tie loĝis komforte pli ol unu jaron, sed neniam forĝesis pri Qingfeng.

Ĉe la festo de Klaro kaj Helo, reveninte de la vizito al la tomboj de antaŭuloj, Geng vidis du malgrandajn vulpojn persekutatajn de hundo, unu forkuris al sovaĝejo kaj la alia kuris survoje. Vidinte Geng, ĝi kriis malĝoje, skuante la kapon kaj voston, kvazaŭ petanta savon. Geng kompatis la vulpon, malligis sian veston, envolvis ĝin kaj revenis. Kiam li metis la vulpon sur sian liton, eliris el la vesto Qingfeng. En granda ĝojo li konsolis ŝin. Qingfeng diris: "Mi ĵus ludis kun mia ĉambristino, neatendite mi estis trafita de tiu fatalaĵo. Se mi ne renkontus vin, mi certe estus formacita de la hundo. Volu ne abomeni min, ke mi ne estas homo." Geng diris: "Mi ĉiutage sopiras vin eĉ en sonĝo. Vidinte vin, mi kvazaŭ akirus raran trezoron. Kiel mi povus abomeni vin!" Qingfeng diris: "Tion la sorto destinis. Kiel mi povus servi vin, se mi ne estus kaptita de la danĝero? Estas feliĉe, ke la ĉambristino certe opinias min pereigita, mi do povos ĉiam vivi ĉe vi." Geng tre

ĝojis kaj aranĝis por ŝi apartan loĝejon aliloke.

Pasis pli ol du jaroj. Iun nokton, Geng estis en legado, Xiao'er subite entrudiĝis. Mirigite Geng ĉesis legi kaj demandis de kie li venis. Xiao'er genuiĝis surplanke kaj lamente diris: "Mia patro estas minacata de morto, kaj nur vi povos savi lin. Li volontis alveni persone por peti vian helpon, sed li havis skrupulon ke vi ne akceptos lin, tial li sendis min ĉi tien." "Pro kio?" demandis Geng. "Ĉu vi konas sinjoridon la trian de Mo-familio?" demandis Xiao'er. "Jes, li estas filo de mia kolego," respondis Geng. "Morgaŭ li preterpasos vian domon. Se li kunportos ĉasitan vulpon, mi petas vin restigi ĝin," diris Xiao'er. "La humiligo antaŭ jaroj jam gravuriĝis en mia memoro. Mi ne kuraĝas rilati al lia afero. Se vi nepre bezonas mian helpon, vi sendu Qingfeng al mi!" diris Geng. "Mia kuzino mortis jam tri jarojn!" diris Xiao'er kun larmoj. "Se tiel estas, mi pli malamas lin!" diris Geng. Li leviĝis, laŭte rekomencis legi libron en la mano kaj ne volis aŭskulti lin plu. Xiao'er leviĝis, laŭte ploris kaj foriris mankovrante la vizaĝon. Geng venis al Qingfeng kaj diris al ŝi la okazintaĵon. Qingfeng demandis terurite: "Ĉu vi ne konsentis?" "Jes, sed ĵus mi ne donis promeson, ĉar mi volas venĝi min por la antaŭa humiligo." Qingfeng ekĝojiĝis: "Mi perdis la gepatrojn jam en la infanaĝo kaj kreskis nutrate de mia onklo. Kvankam antaŭe li ŝokis vin, tamen li ja devis tiel agi por protekti la familian disciplinon." Geng diris: "Vi diris prave, sed la ofendo por mi estas malfacile forgesbla. Se vi vere mortus, mi certe ne sa-

vus lin." Qingfeng diris ridete: "Kiel kruela!"

La sekvantan tagon, sinjorido la tria de Mo-familio vere alvenis sur bele ornamita ĉevalo, akompanate de svarmo da servistoj. Geng bonvenigis lin ĉe la pordo. En la amaso da ĉasaĵoj Geng trovis nigran vulpon trempitan en sango. Li palpis la vulpon kaj trovis ĝin varmeta. Pretekstante fliki difektitan pel-taĵon, Geng petis de li la vulpon. Mo senhezite konsentis. Geng transdonis la vulpon al Qingfeng kaj li mem akompanis la gaston en drinkado. Post foriro de la gasto, Qingfeng ĉirkaŭprenis la vulpon en sia sino. Post tri tagoj, la vulpo revivis kaj transformiĝis en la maljunulon. Levinte la kapon li vidis Qingfeng kaj pensis, ke li jam ne estas en la homa mondo. Qingfeng detale rakontis al li la okazintaĵon. Li dankis Geng por la savo kaj bedaŭris pro la antaŭa ofendo. Poste li diris al Qingfeng: "Mi ĉiam dubis pri via perejo, kaj nun la realo solvis la dubon." Qingfeng diris al Geng: "Se vi ankoraŭ havas korinklinojn al mi, vi pruntedonu al ni la antaŭan domon, por ke mi povu rekompenci la onklon por liaj vivtenado kaj edukado al mi." Geng konsentis. La maljunulo honteme dankis kaj adiaŭis.

En la nokto la maljunulo vere alvenis kun sia familio. De tiam ili vivis harmonie kiel samfamilianoj. Geng kaj Xiao'er ofte havis intimajn interparolojn. Iom post iom kreskis la filo de Geng, naskita de la menciita edzino kaj Xiao'er estis petita lin helpi kiel instruisto por la infano. Li instruis la knabon tre konscience kaj paciencie, kiel bona kvalifikita instruisto.

“ELEKTITAJ VERKOJ DE DENG XIAOPING” ELDONITA

La nomita libro redaktita de la Komisiono por Redaktado de Partia Literaturo sub la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio estas publikigita de la Popola Eldonejo, Pekino, kun eldonokvanto de 12.21 milionoj da ekzempleroj. Ĝi estas vendata en Xinhua-librejoj en diversaj lokoj de la lando de la 1-a de julio kaj bonvenigata de la vasta amaso da kadroj kaj popolanoj.

La libro enhavas 47 gravajn parolojn faritajn de Deng inter 1975 kaj 1982, el kiuj 39 ne publikigis antaŭe.

Liaj verkoj havas ne nur neforviŝeblan historian signifon, sed ankaŭ gravan signifon por gvidi la ĉinan socialisman konstruadon en la nuntempo kaj estonteco.

OLEO KAJ NATURA GASO MALKOVRIATAJ EN LA ORIENTA ĈINA MARO

La unua esplora puto Pinghu n-ro 1, kiu produktas komercan oleon kaj naturan gason, estas borita en la Orienta Ĉina Maro, post kiam la oleputo Longjing n-ro 2 komencis doni naturan gason pasintjare. Tio montris la belan perspektivon de riĉfontoj de oleo kaj natura gaso en la baseno de la Orienta Ĉina Maro.

La puto Pinghu n-ro 1, la plej profunda enmara puto de Ĉinio, estas bone ekipita. Oni akiris de ĝi diversajn valorajn geologiajn materialojn kiel scienca bazon por fari pluan esploradon kaj ekspluatadon.

ĈINIO IMPORTIS AVANGARDAJN TEKNIKOJN

Nun Ĉinio importas el eksterlando 3 000 avangardajn teknikojn en siajn entreprenojn en diversaj

lokoj ĉefe por la industrioj tekstila, malpeza, manĝaja, paka, maŝina kaj elektrona kaj industrioj de subtala kemio, medicino, novaj konstruaj materialoj kaj parto da necesaj krudmaterialoj kaj aliaj materialoj. La afero celas ankaŭ ŝpari energion kaj disvolvi sintezan utiligon.

EKFUNKCIIS LA PLEJ GRANDA ĈINA PRODUKTA LINIO DE GIPSAJ PLATOJ

En la fino de junio Ĉinio finkonstruis kaj ekfunkciigis en Pekino produktan linion, kiu povas fabriki 20 milionojn da kvadrataj metroj da gipsaj platoj jare.

La importita ekipaĵo de tiu linio havas totalan longecon de pli ol 300 metroj. La linio ĉiujare elfaras 25-54 kvadratajn metrojn da gipsaj platoj de malsamaj dikecoj. Baldaŭ ekfunkcios aliaj du laborejoj. Tiuj tri ĉiujare liveros 600 000 kvadratajn metrojn da domkonstruaj materialoj.

431 SCIENC-TEKNIKAJ FRUKTOJ PREMIATAJ

En la fino de junio oni anoncis premiadon al 431 scienc-teknikaj fruktoj de la elektrona industrio de 1982, el kiuj tri ricevis superajn premiojn kaj 106 unuagradajn.

Pli ol 150 fakuloj, invititaj de la Ministerio de Elektrona Industrio, publikigis la rezultaton post 4-taga juĝado. La scienc-teknikaj fruktoj, inkluzive de tiuj pri radaro, televidilo por komunikado kaj disaŭdigo, komputero, elektronaj elementoj kaj aparatoj k.a., montras novan progreson de la scienca tekniko de la ĉina elektrona industrio. Iuj el ili atingis la internacian avangardan nivelon kaj aliaj donis grandan ekonomian rendimenton.

LASERA ĈINLINGVA FOTO- KOMPOSTILO DE LA KVARA GENERACIO SUKCESE FARITA

Ĉinio sukcese faris sian kvarageneracian laseran ĉinlingvan foto-kompostilon. Post ekzameno al la kompostilo la koncerna departe-

mento konstatis, ke ĝiaj kvalito kaj funkcio estas konformaj al la postuloj de la projekto kaj ke ĝia aparato por aŭtomate surkaj demeti plakon kaj ĝia kvar-laserradia balaa sistemo atingis la avangardan nivelon, kiun havas la samspecaj produktadoj de aliaj landoj.

Tia kompostilo, regata de komputero, per kvar faskoj da laseraj radioj balaas pretigitan tekston kaj faras punktojn sur plako. Ĝi reproduktas dekmil ĉinajn ideografiajn en cent sekundoj, 200-oble pli multe ol kiom oni mane kompostas.

BONAJ NOVELOJ, FILMOJ, AŬTOROJ KAJ AKTOROJ PREMIATAJ

Por vigligi literaturan verkadon kaj akceli produktadon de filmoj kaj televidaj filmoj, ĉinaj koncernaj departementoj okazigis en la kurenta jaro aktivadojn por elekti bonajn novelojn, filmojn, televidajn filmojn kaj disaŭdigitajn teatraĵojn de 1982 kaj la plej bonajn reĝisoron kaj filmaktorojn por la sama jaro.

Estis la aktivado aranĝita de la Ĉina Verkista Asocio por premii novelojn, mezlongajn romanojn, nov-stilajn poemojn kaj raportojn, la Tria Aktivado de Premio “Ora Koko” por Ĉinaj Filmoj, la Sesa Aktivado de Premio “Cent Floroj” okazigita de la redakcio de “Popola Filmo”, la aktivado aranĝita de la Kultura Ministerio por premii bonajn filmojn de 1982 kaj la aktivado por elekti bonajn disaŭdigitajn teatraĵojn por ĉinaj geknaboj.

La 73 premiataj verkoj ampleksas diversajn temojn. Oni premiis la plej bonan rakontan filmon “En Mezaĝo”, kiu priskribas la vivon de intelektuloj, la plej bonan rakontan filmon “Ĉeval-paŝtisto”, kiu vidigas, kiel iu junulo iris malfacilan vojon de la vivo, kaj la plej bonan rakontan filmon “Kamelo Xiangzi”, kiu rakontas pri mizera rikiŝisto en la malnova Ĉinio. Oni elektis Wu Yigong kiel la plej bonan reĝisoron kaj Pan Hong kaj

Mi ĉiam estas ĝoja

de LI MEISHENG

Jen familio varma, harmonia kaj enviinda. Ĝiaj membroj helpas unu alian. La aŭtoro ja estas ĝia mastrino. Ŝi estas diligenta kaj virta. Ŝi tre zorgas pri sia edzo kaj efike edukas siajn gefilojn. Ŝi kaj ŝiaj najbaroj respektas kaj komprenas sin reciproke. Ŝi estas bona ekzemplo por la najbaraj mastriroj, tamen ŝi estas nur unu el la milionoj da ordinaraj virinoj de Sanhajo.

— La Red.

Nia familio konsistas el miaj edzo, ses gefiloj kaj mi mem. Por bone aranĝi la hejmon, mi devas aĉeti legomojn, prepari manĝon, purigi la ĉambrojn kaj eduki la gefilojn. Mi plenumas tiujn laborojn ĉiutage preskaŭ tuj de la ellitiĝo ĝis la nokto. Mi estas plene okupita, tamen mi opinias, ke tio estas ne sufero, sed ĝojo por mi. Oni laŭdis, ke mi estas talenta. Laŭ mi, ĉio povas esti en bona ordo, se oni bone aranĝas ĝin.

Mia edzo Xu Zhanting estas 60-jara. Li laboras kiel kontorestro en iu importa kaj eksporta kompanio de manĝaĵo. Antaŭ pli ol 30 jaroj ni geedziĝis. Post tio nia familio vivis el lia nebona salajro. Por pliigi enspezon, mi do brodis en la hejmo. Mi ne ripozis en la tagmezo kaj ofte laboris ĝis ĉ. la 12-a

nokte. La vestoj kaj ŝuoj de la familianoj, ĉu grandaj ĉu malgrandaj, ĉu vatitaj ĉu maldikaj, ĉiuj estis faritaj de mi mem. Mi celis ŝpari monon kaj tajli vestojn bone sidantajn sur ili. Tiu-tempe mi havis plenan energion. Mi senĉese laboris kaj laco neniam kaptis min. Plurfoje mi havis ŝancojn ricevi laboron en fabriko aŭ hospitalo, tamen mi preterlasis ilin pro miaj malgrandaj infanoj kaj multaj hejmlaboroj.

Mi sentas min feliĉa, kvankam ni estas tre okupitaj kaj ne bonhavaj. Mia edzo estas honesta kaj milda, ne fumas nek drinkas. Ĉu kiel fabrikestro en la 50-aj jaroj, ĉu kiel kontorestro nun, li laboras ĉiam aktive. Ĉiutage li iras al la oficejo tuj post la sesa matene kaj revenas hejmen post la oka vespere. Mi

faras ĉiujn hejmlaborojn kaj bonorde aranĝas ĉion, por ke li estu libera de zorgoj. Kiam la sezonoj alternas, mi faras vestojn kaj ŝuojn unue por li, dum mi preferas vesti min per malnovaj. Mi naskis kvin filinojn, sed mia edzo neniam montris malĝojon pro tio. La sesa estas filo, kiun li ne dorlotas. Li plej amas la plej junan filinon. Tio estas malofta en Ĉinio, kie ankoraŭ ekzistas la feŭdisma ideologio, ke oni preferas knabon al knabino.

Ni amas niajn gefilojn, sed ne dorlotas ilin. Ni donas bonan ekzemplon al la gefiloj kaj serioze edukas ilin. Mi ne permesas al ili malŝpari la vivon kaj maldiligenti en la hejmo. Kiam mi estis juna edzino, mi devis okupiĝi kaj pri hejmlaboroj kaj pri brodado. Tiam mi ordonis,

Siqingaowa kiel la plej bonajn film-aktorinojn.

LA ĈINA ART-GIMNASTIKA TEAMO GAJNIS LA TEAMAN SUBĈAMPIONECON

La Ĉina Art-gimnastika Teamo, kies membroj aĝas meznombro nur

13 jarojn, partoprenis en la teama konkurso de la Kvara Internacia Art-gimnastika Konkurso okazinta en la tria tagdeko de junio en Nampo de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio. Ĝi gajnis la teaman subĉampionecon per 37.50 poentoj. La unuan lokon

gajnis la Unua Art-gimnastika Teamo de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio.

La konkurson partoprenis ankaŭ gimnastoj el Rumanio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Sovetunio kaj Hungario.

ke la plej aĝa filino zorgu pri siaj junaj fratinoj. Ili malofte ploris kaj petolis. Kiam ili ekvizitis lernejon, mi diris al ili ĉiutage laŭtlegi tekstojn, reciti lecionojn kaj ne prokrasti hejmtaskojn. Mi ankaŭ helpis ilin venki siajn mankojn. Komprenoble, iajfoje ili estis petolemaj kaj malobeemaj, tiam mi klarigis al ili la veron. Mi neniam batis aŭ laŭte riproĉis ilin. Tiel ili faris al si bonan kutimon. Eĉ la plej juna petolema filo amata de la tuta familio fariĝis modesta kaj disciplina.

Kiam la gefiloj maturiĝis, do nature naskiĝis gepatraj zorgoj pro ilia profesio kaj edziĝo. Mi kuraĝigis miajn infanojn mem elekti vojon de la vivo. Post la diplomitiĝo de mezlernejo mia plej granda filino iris labori en la malproksima nordokcidento, responde al la alvoko de la popola registaro; same la tria filino iris labori en la nordoriento malproksime de la hejmo. Mi ofte skribis al ili, ke ili fikslu tie kaj okazigu sian geedziĝan ceremonion laŭ nova moro. Miaj tri filinoj plenumis mian admonon kaj simple faris la ceremonion. Nun ni havas kvin nepinojn.

Mi ankaŭ ŝatas sociajn aktivadojn, kvankam ŝarĝita per amaso da hejmlaboroj. En 1964 mi eklaboris en loĝantara komitato. Oni elektis min kiel ĝian estron. Same kiel la aliaj, nia loĝantara komitato estas amasa organizo, kiu servas al la loĝantoj. Mi havas relative altan klecon, kvankam mi finis nur lernadon en elementa lernejo. Je mencio de tio mi rememoris la pasintecon. Mia patrino estis prudenta, sed ne sciis legi eĉ unu vorton, pro kio ŝi multe suferis. Tial ŝi metis min en lernejon.

Mia patro forpasis en mia infaneco. Estis malfacile por la patrino financi mian lernadon. Ŝi promesis al mi, ke mi lernu nur tri jarojn. Mi lernis diligente kaj enviciĝis ĉiujfoje inter la unuaj tri elstaraj lernantoj de la klaso. Tial mi lernis ankoraŭ tri jarojn. Poste oni funkciigis mezgradan kurson en la loĝkvartalo, tiam mi jam estis patrino de pluraj infanoj, tamen mi ankoraŭ persistis en la lernado.

Scio donas al la homo saĝon kaj forton. Mi kleriĝis kaj vere fariĝis inteligenta en laboro kaj parolo. Sub nia loĝantara komitato estas 600 familioj. Dank' al la bona kunlaboro de la komitatanoj, ni akiris brilajn atingojn en la publika sekureco, media pureco, konflikto-solvo kaj naskolimigo. Oni vivas bonorde, pace kaj trankvile, malgraŭ ke la loko estas dense loĝata.

En la pasinta jaro oni elektis min kiel avangardan laboranton de la loĝkvartalo pro tio, ke mi faris kontribuon por la loĝantara komitato. Oni elektis ankaŭ mian familion "Kvinbona Familio" (Bone respekti maljunulojn, bone eduki gefilojn, bone subteni la edzan laboron, bone vivi kun la najbaroj kaj bone ŝpari la enspezon). Tial honoroj maltrankviligis min, ĉar mi nur malmulte laboris kaj mia familio estas ordinara.

Mi estas 58-jara. Mia energio estas multe malpli granda ol antaŭe. Miaj okuloj malmiopiĝis. Nun mi ankoraŭ povas stebi, sed kun malalta efiko. Miaj infanoj fariĝis grandaj, eĉ la plej juna filo povas helpi min prepari manĝon kaj ordigi la ĉambrojn. Krom trakti ĉiutage aferojn en la loĝantara komitato, mi ankaŭ



La aŭtoro

aranĝas vivon por miaj gefiloj. Post kiam niaj kvin filinoj ricevis laboron, nia familio fariĝis rimarkinde bonhava. Tamen ni ankoraŭ ŝpareme kaj modeste vivas. Sub mia influo miaj gefiloj alkutimiĝis al simpla vivo.

Kvankam okupita, mi havas iujn ŝatokupojn. En la juneco mi ofte vizitis kinejon kaj interesiĝis aparte pri Shaoxing-ope-ro. Nun pro la relative granda aĝo mi ekŝatis planti florojn kaj bredi orfiŝojn. Mi sentas agrable, kiam mi vidas la prosperajn florojn en la ĉambroj. Ankaŭ bredado de fiŝoj kaj plantado de floroj estas scienca aktivado. Mi estas pripensema pri ĉio. Mi bone flegas eĉ malfacile kultureblajn florojn.

Oni ofte diras, ke mi estas homo kontenta pri ĉio. Jes, sed ne tute prave. Kiu ne havas ĉagrenon kaj postulon? Mi ja deziras amindan nepon kaj pli grandan domon . . .

Evoluo de la ĉina mono

de XIAO QING

LA plej frua mono de Ĉinio estis konko, kiun oni ekuzis kiel monon jam en la dinastioj Xia kaj Shang (la 21-a jc. a. K. — la 11-a jc. a.K.). La konko produktita en la varma maro de la sudo, estis ekzota objekto

interŝanĝita de tiuj du regnoj en la basenoj de la Flava Rivero.

Kiam furore cirkulis la konkforma kupra mono, aperis konkforma kupra mono, la plej frua metalmono de nia lando. En la periodoj de


Printempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regnoj (770 a.K. — 221 a.K.) aperis en Chu-regno en suda Ĉinio ovalaj kupraj monejoj kun ideografiaĵo.


La ŝovelil-forma metalmono, plej frua kaj vaste uzata, okupis gravan lokon en la antikva Ĉinio. Tia monero, muldita imite laŭ terkulturilo ŝovelilo, estis grava cedebla riĉaĵo en la agrokultura regiono kaj funkciis kiel identaĵo en la interŝanĝo de varoj. Alia metalmono en formo de glavo aperis iom poste.

Komence la malsamaj specoj de mono havis ĉiu sian apartan cirkulan sferon. Por kontentigi disvolviĝon de la komerco kaj interŝanĝon de varoj, oni iom post iom transiris la limojn de la sferoj. Poste aperis iu facile uzebla metalmono — monero kun ronda truo. Post kiam la Unua Imperiestro de Qin-dinastio unuigis Ĉinion en la jaro 221 a. K., la ĉinoj ekuzis la unuecan kupran moneron “Duona Taelo” kun kvadrata truo.


En la periodoj de Printempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regnoj la altvalora oro servis kiel mono. Tiam en Chu-regno aperis Yingyuan, la plej antikva ora monero en Ĉinio.

Ŝovelil-forma kupra monero






Kupra monero "Duona Taelo"



Kupra monero "Kvin Ĝu"



Kupra monero "Kaj Juan Tong Baŭ"

Post la naskiĝo de Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.) ĝia imperiestro Wudi starigis la sistemon de metalmono "Kvin Ĝu" en la jaro 118 a. K. (unu ĝu egalas al 1/480 kg.). Tio estis sukcesa monsistemo, kiu daŭris pli ol 700 jarojn.

En Tang-dinastio (618-907 p. K.) oni starigis la monsistemon "Kaj Juan Tong Baŭ", kiu daŭris pli ol mil jarojn. Jen alia


grava monsistemo en la ĉina historio. La uzado de "Kaj Juan Tong Baŭ" grave influis la ĉinan pez-mezuradon. Antaŭ tio en Ĉinio oni ĉiam prenis 24 ĝu kiel unu taelon, sed ekde tiam iom post iom formiĝis la decimala nombrosistemo, t. e. dek ĉjan-oj egalas al unu taelo.

Oro, kiel interŝanĝaĵo en la komerco, atingis sian kulminon en la Okcidenta Han-dinastio

(206 a. K. — 24 p. K.) kaj de post tiam ĝia cirkulado malvigliĝis iom post iom. Oro malaperis en la cirkula sfero en la 3-a jc. kaj perdis sian funkcion de oficiala mono.

En Tang-dinastio oni laŭleĝe uzis monerojn kaj silkajojn samtempe en la interŝanĝo. Tiam oni pagis silkajon por granda interŝanĝo kaj kuprajn monerojn por malgranda. Tamen la sil-

LOKOJ MENCIIITAJ EN ĈI TIU NUMERO




1. Pekino
2. Ŝanhajo
3. Shijiusuo
4. Zibo
5. Yanzhou
6. Qinhuangdao
7. Guangzhou
8. Changsha
9. Longzhou
10. Nanjing
11. Yangzhou
12. Luoyang
13. Benxi
14. Taxkorgan

kajo perdis sian originalan valoron tuj post la tondado. Pro tio ĝi ne taŭgis por intersanĝo, tial en Song-dinastio (960-1269) la valora arĝento ekcirkulis kiel mono en la socio, kio travivis tre longan tempon.

La plej antikva monpapero de la mondo aperis en Ĉinio en la fino de la deka jarcento. Ĝi estis uzata kiel sola leĝa valuto en la vasta Yuan-imperio (1279—1368). Nur en Ming-dinastio (1368—1644) arĝento fariĝis ĝenerale uzata mono. Tiam oni pagis arĝenton por granda intersanĝo kaj kuprajn monerojn por malgranda. Por facile cirkuligi arĝentan monon, oni plej ofte muldis ŝu-forman arĝentan ingoton 50 taelojn pezant.

En la moderna epoko en Ĉinio cirkulis ĉefe arĝenta monero kaj papermono. En 1933 Ĉinio malpermesis uzadon de arĝento laŭ ĝia pezo en la komerco kaj ekuzis nur arĝentajn monerojn. En 1935 Ĉinio komencis emisii monbiletojn kaj malpermesis cirkuladon de arĝentaj moneroj. La


Ŝu-forma arĝenta ingoto



seninterrompaj militoj kaj senbrida emisiado fare de la malnova registaro kaŭzis seriozan inflacion, grandan kaoson en la monsystemo kaj multe devalutis la monbiletojn, tiel ke la arĝentaj moneroj cirkulis denove.

La 1-an de decembro 1948, por bonvenigi la naskiĝon de la nova Ĉinio, la liberigitaj regionoj gvidataj de la Komunista

Partio de Ĉinio fondis la Ĉinan Popolan Bankon kaj komencis emisii la monpaperon Renminbi Post la naskiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en la 1-a de oktobro 1949 ĝia registaro faris multajn klopodojn, fine venkis la 12-jaran inflacion kaj starigis la unuecan monsystemon Renminbi. La de ĝi emisiitaj juanoj fariĝis unu el la stabilaj kaj reputacihavaj monoj en la mondo.



Papermono en Yuan-dinastio



EN LA REGIONOJ DE NACIMALPLIMULTOJ

de LAO BAI

JULIE mi vizitis la taĝikan naciecon kun longa historio kaj kuriozaj moroj, kiu loĝas en la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono de la nordokcidenta parto de Ĉinio.

ANTIKVA KASTELO KAJ LEGENDO

Post 13-hora balanciĝado sur zigzaga montvojo nia aŭto atingis Pamiron 3 500 metrojn super la marnivelo kaj ekgalopis sur asfaltita vojo en la Taxkorgana Taĝika Aŭtonoma Gubernio. La taĝika nacieco kredas je Islamo. Ĝi prenas brutobredadon kiel sian ĉefan okupon kaj samtempe entreprenas agrokulturon. En Ĉinio vivas pli ol 23 000 taĝikoj, 70% el kiuj loĝas en la gubernio.

Taxkorgan signifas "ŝtonan kastelon" en la taĝika lingvo. Sed la gubernia urbo, ĉirkaŭata de dekoj da neĝmontoj, kovras malpli ol unu kvadratan kilometron da areo. Kie povas esti "kastelo"? Kiam mi pensis pri tio, la aŭto

subite haltis. La ŝoforo montrante la nordan monteton diris al mi: "Ĝuste tie estas la antikva 'ŝtona kastelo.'" Bedaŭrinde jam falis vespera krepusko kaj ĉio fariĝis nebula.

La sekvan tagon, mi rigardis la ruinon, kie ĉie restas ŝtonpecoj, detruitaj domoj kaj disfalinta urbomuro farita el sablo. La taĝika historio ne legeblas en la kronika verko, sed la homaj ostoj, ŝtonaj instrumentoj kaj argilaĵoj, eltombigitaj ĉe la loko en 1977, pruvis, ke tie jam loĝis nacimalplimultaj triboj antaŭ 3 000 jaroj. La kastelo estis rekonstruita en Yuan-dinastio (1279-1368 p. K.) sur la originala bazo.

Pri "ŝtona kastelo" mi aŭdis belan legendon: Antaŭ tre longe, iu reĝo de Persio songis pri iu bela knabino, kiu pretendis, ke ŝi venis el orienta lando, ĉe kiu leviĝas la suno. Vekiĝinte, la reĝo sendis du korteganojn al la oriento serĉi la belulinon.

Kortuŝite de la sincereco de la reĝo, la ĉina imperiestro edziniĝis al li sian filinon kaj sendis palacajn knabinojn eskorti ŝin al Persio. Neatendite, kiam ili atingis Pamiron, la vojo estis barita. Ili devis konstrui kastelon sur alta monto. Kaj kiam ili sin preparis por daŭrigi la vojaĝon al la okcidento, ili trovis la principinon graveda. Palaca knabino diris al la persaj korteganoj: "Precize en ĉiu tagmezo de la lastaj monatoj iu bela knabo malsupreniris de la suno kaj kunestis kun la princino..." Timante mortpunon post sia hejmeveno, la korteganoj decidis fiksloĝi tie. Poste la princino naskis filon, kiu poste fariĝis reĝo. Li ja estis la unua reĝo de la regno Qiepantuoshe. Laŭ historiaj notoj la antikva regno Qiepantuoshe estas la nuna Taxkorgan.

La nuna guberniurbo de Taxkorgan, situanta sudokcidente de la malnova urbo, estas nova

urbo kun nacia stilo. En ĝi unu rekta strato etendiĝas okcidenten. La gubernia popola registaro kaj ĝiaj ĉefaj institucioj sidas en la orienta parto de la urbo. Ambaŭflanke de la strato staras lernejoj, magazenoj, hospitalo, poŝtoŝtanco kaj kinejo. En ĉiu festotago la lokanoj portas diversformajn vestojn kaj promenadas en la strato kaj la urbo dronas en vigleco.

VESTOJ, ORNAMAĴOJ KAJ ETIKETOJ

Iutage mi vizitis la familion de Amadehan en la komunumo Taharma. Ĝi, same kiel familioj de multaj aliaj taĝikoj, estas granda familio. Amadehan havas patrinon kaj du fratojn. En la familio vivas harmonie 23 membroj de kvar generacioj. Informiĝinte, ke venis gasto el Pekino, pli-ol-60-jara Amadehan tuj vokis ĉiujn siajn familianojn iri eksteren renkonte al mi. Li, en taĝika robo kaj ledpotoj, kaj kun brodita rubando ĉe la talio, varme manpremis min dirante: "Asalama laikun", kiu signifas "benon al vi" en la antikva araba lingvo. Sekve de tio, ni ambaŭ kisis mandorsojn unu al la alia laŭ la nacia kutimo. La maljunulo kun ŝerco di-

ris: "Se virinoj renkontiĝas, ili ja kisas unu alian." Tiumomente kuris al mi iu knabineto, unue ŝi riverencis antaŭ mi kaj poste etendis al mi sian dekstran manon. La maljunulo petis min karesi ŝian verton kaj kisi ŝian mankavon.

Salutinte ĉiujn liajn familiaĵojn, mi sekvis la mastron en grandan ĉambron kun volbo. Ĉiuflanke de la ĉambro kuŝas terlitoj kaj sur tri terlitoj sterniĝas lankovriloj. Laŭ la kutimo la plejaĝuloj aŭ honoraj gastoj devas sidi maldekstre. Laŭvice ni sidis en duoncirklo. La mastrino prezentis buterteon kaj bakitajn manĝaĵojn. Ni manĝante interparolis. Unue ni interparolis pri virinaj vestoj kaj ornamaĵoj. Montrante sian junan bofilinon, la maljunulo diris, ke la taĝikaj virinoj ŝatas beligi sin. Ili ofte sin vestas per ĉemizoj kaj jupoj ruĝaj aŭ verdaj. Veŝto, brodita zonrubando kaj gartuko estas nepre necesaj por ili. Ĉirkaŭ ilia kolo ĉiam pendas koliero el 3-4 rozarioj da ruĝaj bidoj kaj 4-5 arĝentaj moneroj. La mastrino konigis al mi: "Ĉe ni oni povas distingi fraŭlinon disde juna edzino laŭ iliaj harplektaĵoj." La maljunulino petis sian bofilinon kaj filinon forturniĝi. Tiam mi vidis, ke la harplektaĵo de ŝia bofilino estas

ornamita per vico da blankaj butonoj kaj ĉe la ekstremo de la harplektaĵo estas ligita kvasto farita el fadenoj arĝenta, ruĝa kaj verda, dum la harplektaĵo de ŝia filino estas ornamita nur per ruĝa kvasto.

AMO KAJ GEEDZIĜA CEREMONIO

Iu knabo diris al mi, ke antaŭ nelonge lia fianĉino, kiu loĝas en montaro, sendis al li saketon broditan per koloraj fadenoj kun duonbruligitaj alumetoj kaj abrikot-kernoj ene. Vidinte tion la saĝa knabo tuj komprenis la koron de sia fianĉino: "Mia korinklinulo, mi sopiras al vi tage kaj nokte. Mia koro (kiun simbolas la abrikot-kernoj) jam karbiĝis (kiel alumetoj)." La knabo sendis al ŝi kudritan per ruĝa fadenino flavan saketon (kiu simbolas bonaŭguron) kun flavaj ŝtonpecoj kaj iom da salo. Ilia signifo estas: "Mia koro pezas kiel ŝtono pro longa disiĝo kun vi, sed mi trinkis vian salakvon, tial mi neniam forgesos vin."

La geedziĝa ceremonio de la taĝikaj gejunuloj estas aparte interesa. Antaŭ du tagoj de la geedziĝa ceremonio la ĉefaj parencoj de la gefianĉoj komencis inviti intimajn amikojn al la ceremonio. En la tago, kiam oka-

Al parencoj



SUI-DINASTIO UNUIGIS ĈINION

de BA HONG

EN la lasta periodo de la sesa jarcento Ĉinio estis dividita en du partojn: Norda Zhou-dinastio regis la nordan Ĉinion kaj Chen-dinastio la sudan.

POLITIKOJ FARE DE LA UNUA IMPERiestRO DE SUI-DINASTIO

La imperiestro Xuandi de la Norda Zhou-dinastio estis tirano, sed lia bopatro Yang Jian estis kapabla komandanto kaj ĝuis altan reputacion en politiko. Post kiam surtroniĝis la filo de Xuandi, Yang Jian faris

palacan ŝtatrenverson kaj facile prenis la regadon en siajn manojn en 581. Li starigis Sui-dinastion kaj mem imperiestriĝis. La historiistoj nomis lin imperiestro Wendi de Sui-dinastio. Yang Jian abolis severajn politikojn, simpligis la dekretojn kaj iniciatis ŝparemon, dank' al kio li ricevis vastan subtenadon de la popolo. Tio kreis por li favorajn kondiĉojn unuigi Ĉinion.

Tiam la lasta reganto de Chen-dinastio en la sudo vivis diboĉe, ĉiutage sin amuzis per

festenoj kun siaj kromedzinoj kaj ne prizorgis la ŝtatajn aferojn. La ŝtato dronis en dekadenco.

Matene de la unua de la unua monato laŭ la ĉina lun-kalendaro 589, ĉion kovris densa nebulo, Sui-armeo en du kolonoj senbrue transpasis Jangzi-riveron, okupis Jiangkang, la ĉefurbon de Chen-dinastio (la nuna Nankino de Jiangsu-provinco) kaj kaptis la imperiestron de Chen-dinastio, ne renkontinte fortan reziston. Jen pereis la dinastio Chen.

zas la ceremonio, venas senescepte ĉiuj vilaĝanoj, junaj kaj maljunaj, ĉiu kun iomete da faruno por ŝuti ĝin sur muron de la nova geedza paro, esprimante sian gratulon. La novedzo kaj novedzino surmetas novajn vestojn helpate de plejaĝulo. La ĉapo de la novedzo devas esti ĉirkaŭvolvita per blanka kaj ruĝa silkaĵoj, dum la novedzino havas sur la kapo la de ŝi broditan ĉapon kaj ŝirmas la kapon kaj vizaĝon per ruĝa silkaĵo. Je la unua tago de la geedziĝa ceremonio, akompanate de siaj parencoj kaj intimaj amikoj, kiuj dancas kaj kantas survoje, la novedzo rajdas sur ĉevalo por venigi la novedzinon. Kiam ili atingas la hejmon de la noved-

zino, ties familianoj intence ne akceptis ilin, sed anstataŭe ŝiaj junaj parencoj faris demandojn al la novedzo, starante malantaŭ la pordo. Antaŭ ol respektople- ne respondi, la novedzo estas malpermesita eniri en la domon. La geedziĝa ceremonio, prezidata de imamo laŭ la islamaj reguloj estas okazigata en la hejmo de la novedzino. Post preĝo por la novaj geedzoj, la atestanto por la geedziĝo alportas bovlon da salakvo kaj petas la novan geedzan paron trinki, kio simbolas, ke en la estonta vivo la novgeedzoj kune dividos ĝojon kaj suferon. Post kiam ili interŝanĝis ringojn, la plejaĝulo ŝutas iom da faruno sur iliajn kapojn, kio simbolas harmonion dum la tuta

vivo. La sekvan tagon, la novgeedzoj venas al la hejmo de la edzo. Survoje ili faras surĉevalan konkurson pri ŝafo: Antaŭe oni metas buĉitan ŝafon en difinitan lokon. Ĉiuj konkursantoj sin jetas al la loko por akiri la ŝafon. Kiam la ŝafo estas dispecigita de forta kaptado, la konkurso atingas sian kulminon. Veninte al la hejmo de la novedzo, la novedzino unue salutas respektive la bogepatrojn kaj poste parencojn kaj amikojn. Por celebri la geedziĝon ĉiuj dancas kaj kantas ĝis la posttagmezo de la tria tago. La ceremonio finiĝas nur post kiam la atestanto por la geedziĝo demetas la vizaĝan gatzukon de sur la kapo de la novedzino.

Post unuigo de Ĉinio, imperiestro Yang Jian praktikis diversajn politikojn por firmigi la landan unuecon, kio finis la militon daŭrintan 300 jarojn. Li faris multajn reformojn kaj starigis potencon centran registaron. Li simpligis la strukturon de la lokaj registaroj kaj reformis armean sistemon. Li abolis la enoficigan sistemon monopoligitan de aristokrataj kaj tiranaj familioj dum pli ol 300 jaroj, kaj eknomumis la ŝtatajn oficistojn per ekzameno. Li alprenis ekonomiajn politikojn imposti mal multe kaj laŭdi terkulturadon kaj kulturadon de morusarboj, kio multe prosperigis la agrikulturajn produktadon kaj potencigis la ŝtaton kun tagoj. En 592 financaj oficistoj raportis: "La ŝtataj staploj estas plenaj de grenoj kaj ŝtofoj, eĉ la koridoroj estas okupataj." La imperiestro ordonis konstrui pliajn staplojn. Poste oni raportis: "Ankaŭ la novaj staploj estas plenaj de grenoj kaj ŝtofoj." La imperiestro ordonis: "La lokaj registaroj disdonu ilin al la popolanoj." Jam post pereigo de Chen-dinastio li dekretis, ke la popolo sude de Jangzi-rivero estu senigita je dekjara imposto. Tia riĉa stato aperis nur en la komenca periodo de la Okcidenta Han-dinastio sub la imperiestroj Wendi kaj Jingdi.

Ankaŭ la loĝantaro rapide kreskis pro la socia stabileco kaj la ekonomia prospero. En 606 p.K. la lando jam havis 8 907 000 familiojn kun pli ol 46 milionoj da loĝantoj, preskaŭ same kiel la Orienta Han-dinastio.

KONSTRUI LA ORIENTAN ĈEFURBON KAJ FOSI LA GRANDAN KANALON

Imperiestro Yang Guang (569-618 p. K.), la dua filo de

Yang Jian, estis tamen fama tirano en la ĉina historio. Li faris multajn malbonaĵojn. Ankaŭ sia surtroniĝo li intrigis por nuligi la kronprincecon de sia pliaĝa frato kaj mortigi la patron.

En 605 p. K. t.e. en la unua jaro post sia surtroniĝo la imperiestro Yang Guang decidis preni Luoyang kiel novan, t. e. orientan ĉefurbon. La grand-skala konstruado de la orienta ĉefurbo daŭris de la tria monato de la jaro ĝis la unua monato de la sekvinta jaro. Ĉiumonate estis rekviziitaj du milionoj da popolanoj. La materialoj por konstrui la palacojn estis transportitaj de malproksimaj lokoj sude de Jangzi-rivero. Unu arbotrunkego bezonis dumil homojn por transportado. Kaŭze de la peza laboro multaj mortis survoje. Jen kiel konstruiĝis la altaj urbomuroj kaj pompaj palacoj de Luoyang.

Forpasis pli ol 1 300 jaroj. La pasinta orienta ĉefurbo estis jam de longe detruita, sed hodiaŭ rec videblas la tiamaj postlasitaj urbopordegoj kaj kloakoj okcidente de Luoyang. Historiaj materialoj diras, ke nordokcidente de Luoyang sidis la imperiestraj palacoj kaj apud ili troviĝis la registaraj sidejoj. En la urbo troviĝis ankaŭ loĝkvartaloj kaj tri komercaj kvartaloj, el kiuj unu havis 12 pordojn kaj 3 000 vendejojn. Tiam dekmiloj da familioj de riĉaj komercistoj kaj pli ol 3 000 metiartistaj familioj translokiĝis al la ĉefurbo. Estas imageble, kiel prospera estis la tiama Luoyang!

La Granda Kanalo estas rigardata kiel unu el la plej grandaj konstruaĵoj en la antikva Ĉinio. Por fortigi sian regadon al la nordo kaj prirabadon al la sudo, la imperiestro Yang Guang or-


donis fosi la Grandan Kanalon kun Luoyang kiel la centro. La kanalo etendiĝas suden ĝis Yuhang kaj norden ĝis Zhuoxian. Ĝi, longa je dumil kilometroj, kunligas la riverojn Haihe, Huaihe, Jangzi, Qiantang kaj la Flavan Riveron. Oni starigis digojn kaj plantis salikojn ambaŭborde.

La konstruado de la kanalo, palacoj kaj drakaj ŝipoj kaŭzis morton de multaj popolanoj. Por eviti la rekvizion kaj morton aliloke nemalmultaj kunlarroj dehaki sian manon aŭ piedon.

TURISMO KAJ PARADO

Yangdi estis tirano luksema kaj vojaĝema. Por vojaĝi al la sudo laŭ la kanalo, li ordonis fari dekmilon da drakŝipoj kaj aliaj ŝipoj. Li mem veturis per kvaretaĝa ŝipo, dum liaj kromedzinoj, princoj, princinoj kaj altrangaj oficistoj veturis per miloj da ŝipoj. En lia vojaĝo la sekvantaro nombris ĉ. 200 000 homojn kaj ŝiptiristaro 80 000. Ambaŭborde flirtis koloraj flagoj, ĉiuj lokoj, kiujn ili trapasis, devis senescepte provizi la imperiestron kaj liajn sekvantojn per altklasaj frandaĵoj. Krome, li vojaĝis ankaŭ en la provincoj ekz. Hebei, Interna Mongolio, Shanxi, Henan, Qinghai kaj Gansu.

Li plurfoje faris inspektadon al la Interna Mongolio en nordo kaj Zhangye en la okcidento por montri sian majeston. En 607 p. K., li inspektis la nordon ekster la Granda Muro kun 500 000 militistoj kaj 100 000 ĉevaloj. Antaŭ la inspekto li ordonis konstrui porteblan urbon kaj moveblan palacon kun radoj sube, kie povis loĝi centoj da homoj. La portebla urbo estis



Bildo pri fosado de la Granda Kanalo en Sui-dinastio

malkonstruebla kun periferio de kvar kilometroj kaj kun lignaj tabuloj kiel skeleto ŝirmita per ŝtofo kun koloraj desegnoj. Sur la urbomuro flirtis flagoj kaj patrolis militistoj. Post kiam li venis al la stepo ekster la Granda Muro, la militistoj stariĝis en unu nokto la urbon kun palacoj ene. Tion vidinte, tribestoj de Tujue (antikva nacimallimulto en la norda parto de Ĉinio) estis mirigita kaj prenis la subitan aperon de la urbo kiel dian forton. Ili deĉevaliĝis je pluraj kilometroj for de la urbo, rampis antaŭen kaj respektople- ne prezentis al la imperiestro Yang Guang ĉevalojn, bovojn, kamelojn kaj ŝafojn. La imperiestro donacis al ili grandan kvanton da oro kaj silkaĵo.

FINIĜO DE LA TIRANO

Yang Guang trifoje (de 612 ĝis 614 p.K.) invadis la nordan

najbaran landon, Koreion, kaj trafis ĉiufoje malvenkon. Por konduki la militon li mobilizis pli ol tri milionojn da militistoj kaj portistoj, rezulte de tio, en multaj vilaĝoj preskaŭ ne videblis plenkreskaj viroj. Tiam estis rekviziiciitaj eĉ virinoj. Tiam en Henan kaj Shandong okazis superakvo, kiu inundis multajn lokojn. La vasta kamparano ne povis toleri tian mizeran vivon kaj eksplodis granda kamparana leviĝo en tiuj lokoj. En 616 p.K. la armeoj de la leviĝintaj kamparanoj en la tuta lando ampleksis milionojn da personoj.

Kiam la flamo de la kamparana insurekcio ardis tra la tuta lando, la lokaj oficistoj kaj generaloj unu post alia sendependiĝis de la centra registaro. Inter ili Li Yuan leviĝis en Taiyuan kaj okupis Guanzhong-regionon (en la nuna Shaanxi-provinco). Liaj fortoj fariĝis des

pli grandaj. Poste li fariĝis la fondinto de Tang-imperio, la unua imperiestro de Tang-dinastio.

En 616 Yang Guang fuĝis al la provizora palaco de Jiangdu (la nuna Yangzhou de Jiangsu-provinco) kaj ne kuraĝis reveni al Luoyang. Poste, kiam li informiĝis, ke la armeo de Wangang, la plej forta el la insurekciantaj armeoj, sieĝis Luoyang kaj publikigis ordonon por puni liajn krimojn, li ĉiutage konsterniĝis kaj diris al si antaŭ la spegulo: "Bona kapo, kiu vin forhakos!" Ankaŭ li mem bone sciis, ke la perejo de la dinastio estas neevitebla, kaj preparis por si venenan vinon. Li ne atendis, ke lia gvardio ribelis kaj la venena vino perdiĝis. Li timis esti senkapigita kaj petis siajn sekvantojn strangoli lin per silka zono. En 618 p.K. pereis Sui-dinastio, kiu daŭris 38 jarojn.



Ĝentileco de Tajlando

Tajlando estas vaste konata kiel lando de ĝentileco. Kien ajn vi iras, tie vi trovas la junulojn ĝentilaj, maljunulojn afablaj kaj virinojn diskretaj.

Ĉe renkontiĝo tajlandanoj salutas sin reciproke per kunmeto de la manplatoj kaj milda klino de la kapo. Antaŭ maljunuloj oni levas la kunmetitajn manojn ĝis la frunto; kaj ĉe renkontiĝo kun samgeneracianoj oni levas la manojn nur ĝis

la nazo. Por resaluti junulojn, maljunuloj levas la manojn ĝis antaŭ la brusto.

Salutate oni devas respondi. Kunmeto de la manplatoj povas anstataŭi manpremon. Oficistoj kaj intelektuloj salutas sin reciproke ankaŭ per manpremo, sed inter viroj kaj virinoj manpremo tute ne decas.

Tajlandanoj rigardas la kapon plej sankta parto de la korpo. Frivola kareso de alies kapo estas ofenda. Eĉ la kapon de la infanoj oni ne rajtas karesi, escepte de la reĝo, eminentaj bonzoj kaj la gepatroj. Ĉu oni ne razas? Jes ja, sed razisto devas diri "pardonon" antaŭ ol eklabori.

Tajlandanoj prezentas objekton per la dekstra mano, kaj en solenaj okazoj per ambaŭ manoj. Prezenti objekton per la maldekstra mano

signifas malestimon, ĉar tajlandanoj rigardas la dekstran manon pura kaj la maldekstran malpura. Ĵeti objekton al aliaj estas netolereble.

La pozo de sidado estas tre atentinda. Sidi kun krucitaj gamboj estas ne ĝentile. Oni ne devas direkti siajn plandumojn al aliaj, ĉar tio signifas piedpremon al aliaj. Virino devas sidi kun kunmetitaj kruroj; se ne, oni rigardas ŝin necivilizita.

Dum interparolo kun gasto oni ne devas porti sunokulvitrojn, nek montri per fingro la alparolaton.

Irinte antaŭ iun, oni devas klini la korpon en signo de pardonpeto. Tio estas necesa precipe por la virinoj.

Antaŭ ol iri al templo por incensi aŭ viziti, oni devas vesti sin bonorde kaj pure. Ĉe la enirejo oni devas demeti la ŝuojn por ne "malpurigi" la sanktan lokon.



Novjaraj Kutimoj de Japanio

Ankoraŭ konserviĝas en Japanio tradiciaj novjaraj kutimoj. Antaŭvespere de la Nova Jaro, ĉiuj restas hejme por atendi la noktomezon kaj manĝas vermiĉelojn el fagopira faruno. Ĉe la noktomezo en la temploj fumas la incensoj kaj sonoras la sonoriloj. Oni kredas, ke ĉagrenoj reduktiĝas kun ĉiu frapo de sonoriloj kaj neniĝas, post kiam ili sonoras 108-foje. Aŭdinte la sonoradon, ĉiuj svarmas en la templojn por incensi, preĝi kaj tiel plu. En la mateno oni trinkas novjaran vinon speciale preparitan, manĝas haringan frajon, nigrajn sojfabojn kaj malgrandajn sekigitajn fiŝojn kuiritajn en sojo kaj iom dolĉe spicitajn. Oni kredas, ke tiuj manĝaĵoj alportos feliĉon kaj prosperon al la familio.

En la festotagoj ĉiu familio manĝas supren kun farunaĵo el glueca rizo kaj pendigas super la pordo pajlan ŝnuron aŭ ringon el pajla ŝnuro. Cetere oni algluas al la pordo de la loĝejo papertondajojn en figuroj de gruo, testudo k.s. simbolantaj longvivecon. Oni starigas antaŭ la pordoj de kompanioj aŭ ĉe vojkruciĝoj festajn arkojn el bambuo kaj branĉoj de pino kaj umearbo. Ĉu individuoj, ĉu societoj, ĉiuj reciprokas novjarajn kartojn. Pli da ricevitaj novjaraj karto aŭguras feliĉon en la nova jaro. Oni kutime gratulas siajn najbarojn, parencojn kaj amikojn en la mateno de la Novjara Tago. Eĉ infanoj tiel agas. "Feliĉan novjaron" estas la unua vorto ĉe renkontiĝo en tiu tago.

Insulo de gemoj

Pro siaj abundaj gemoj la insularo Srilankao en la Hinda

Oceano estas nomata insulo de gemoj. Kaj eĉ la formo de la insulo similas al neprilaborita juvelŝtono. La insulo produktas gemojn de pli ol 20 specoj. Ĉu rubenoj, ĉu safiroj, ĉu katokuloj kun variantaj rebriloj, ĉiuj plaĉas al la okuloj. Antaŭ 7 jaroj oni trovis tie grandan rubenon pezantan 362 karatojn, la trian grandan en la mondo, kiu estas rigardata kiel gloro por Srilankao.

Ĉ. duonmiliono da homoj de la lando okupiĝas per elfosado kaj prilaboro de gemoj. Se iu trovas juvelŝtonon, li tuj fariĝas granda riĉulo, sed la plejparto de la prifosantoj restas sen io valora. Oni klasifikas la trovitajn juvelŝtonojn laŭ iliaj speco, koloro kaj grandeco kaj pakas ilin en vaksitan paperon. La valorojn taksas komercistoj kaj gemotajlistoj.

En la pasinteco kontrabando pri gemoj estis tre serioza. Antaŭ nelonge la ŝtato establis kompanion de gemoj, malpermesis kontrabandon, bridis prifosadon kaj limigis la



nombro de prifosantoj. Tiel kontrabandistoj jam ne povis profitegi el gemoj. La ŝtato superregis la eksporton de gemoj, kaj gemoj fariĝis tre grava eksportajo vicigita nur post teo, kaŭĉuko kaj kokosoj. En la pasinteco Srilankao ĉiujare eksportis gemojn valorantajn malpli ol 30 000 usonajn dolarojn, sed nun la eksporta valoro atingis preskaŭ 34 milionojn da usonaj dolaroj.

Ilustritaj de LU PING





EN la Ekspozicio de Ĉinaj Tradiciaj Artoj, kiu ekokazis en Ĉikago, Usono, en junio kurantjare, troviĝis altvalora artaĵo — ambaŭflanka brodaĵo “Belulino en Buduaro”. Per du kontraste malsamaj figuroj delikate broditaj sur ambaŭ flankoj de nilona gazo maldika kiel cikada flugilo, ĝi prezentas ĉinan antikvan belulinon Yang Yuhuan en du malsamaj periodoj: sur unu flanko — floranta fraŭlino kiu, en blanka muslina bluzo kaj ruĝa silka jupo, ludas *konghou*, ĉinan antikvan kordinstrumenton, en sia buduaro dekoraciita per kurtenoj; kaj sur la alia — serena kaj memkontenta kromedzino favorata de imperiestro estas absorbita en sia muzikilo-ludo. La du figuroj diferencas inter si kaj per teniĝoj kaj per koloroj. Tiu majstra artaĵo altiris ĝeneralan intereson de la vizitantoj per sia originaleco, ĉarmo kaj delikateco. Ĝi estas la produktaĵo de la Brodaĵo-fabriko de Hunan-provinco.

La bela baseno de Xiangjiang-rivero, kun Changsha, la ĉefurbo de Hunan-provinco, kiel la centro, estas la lulilo de la Hunan-a brodarto. La brodaĵo estas farita per diverskoloraj silkaj aŭ lanaj fadenoj sur fono el silka, nilona aŭ aliaj teksaĵoj. Kiel speciala metiartaĵo kun naciaj trajtoj, ĝi ofte sin montras pli viveca kaj versimila ol la pentraĵo, laŭ kiu ĝi estas elbrodita. La brodado baziĝas sur ĉinstilaj pentraĵoj kaj, per pli ol 70 kudromanieroj kaj fadenoj de ĉirkaŭ 200 koloroj kaj 500 nuancoj, reliefe prezentas homojn, pejzaĝojn, bestojn, birdojn, florojn ktp. kun subtila kaj milnuanca bunteco. La brodaĵo, kune kun tiuj de Suzhou, Guangdong kaj Sichuan, estas konata kiel fama brodaĵo de Ĉinio.

Antaŭ nelonge mi speciale veturis de Pekino al Changsha por viziti la nomitan brodaĵo-fabrikon. En ĝia eksponejo miajn okulojn frapis la grandnombraj

delikataj brodaĵoj, inkluzive de surtabla ekrano kelkdek centimetrojn alta kaj surmura pendado 4.5 metrojn larĝa. Interalie mi vidis broditajn vivbezonaĵojn, kiaj satenaj litkovriloj kun broditaj drakoj kaj feniksoj, kuseno-tegiloj kun diversaj desegnoj ktp, broditajn portretojn, la brodaĵon “Vespera Kiosko” kiu prezentas faman vidindaĵon de Hunan-provinco kaj tiun “Ruĝflaga Kanalo”, kiu spegulas sukceson en la socialisma konstruado, kaj serion da brodaĵoj bildigantaj pitoreskejojn de la Flava Rivero, Lushan-monto kaj Guilin. Aparte brilaj estis diversspecaj ambaŭflankaj brodaĵoj, kiuj teknike rompis la tradician rutinon de la brodado.

Mi informiĝis de Yang Yingxiu, asistanta ĉefingeniero, ke la Huana-a brodarto havas longan historion. Inter la silkajoj elterigitaj el Han-dinastia Tombo N-ro 1 ĉe Mawangdui, Changsha, en aprilo 1972, troviĝas la silkaj brodaĵoj “Longviveco”

kaj "Ŝvebado en Nubaro", kies kudromanieroj, oni konstatis, similas al tiuj de la moderna Hunan-a brodado. Tio klare montras, ke la nomita brodarto ekzistis almenaŭ pli ol 2000 jarojn. Historiaj notoj diras, ke la brodarto fontis el ornamadoj, kiujn vilaĝanoj faris sur infanaj vestoj kaj sur monujoj kaj tabakujo de sia edzo. Poste famaj pentristoj faris desegnadon por brodaĵoj kaj per tio enkondukis la tradician ĉinstilan pikturon en la Hunan-an brodarton, tiel ke ĝi fariĝis arto kun sia originaleco.

En la antikveco la brodaĵoj ĝenerale servis kiel luksaĵo de korteganoj kaj nobeloj. Nur en la komenco de la 17-a jarcento ekestis en Changsha metiejo, kie oni faris kaj vendis brodaĵojn. En la komenco de la 20-a jarcento unuj post aliaj aperis firmaoj pri brodaĵoj, funkciigataj de industriistoj-komercistoj, kaj la Hunan-a brodaĵo, kiel valora artaĵo, ekhavis grandan debiton en kaj eksterlande. Ĝi sin trovis ĉe la internaciaj foiroj okazintaj en Japanio, Panamio kaj Usono kaj plurfoje gajnis premiojn. Eĉ oran medalon oni aljuĝis al ĝi, kiam ĝi estis ekspoziciata en Ĉikago, Usono, en 1933.

En la jaro 1956 individuaj brodistoj organiziĝis en kooperativojn. En 1958 brodaĵo-fabrikoj stariĝis sinsekve en Changsha kaj diversaj gubernioj de Hunan-provinco. Nun la nombro de profesiaj brodistoj en la provinco jam superis pli ol 60 000. En 1979 fondiĝis la Instituto pri Brodado de Hunan-provinco, kiu kolektis al si eminentajn metiartistojn por esplori la Hunan-an brodadon kaj teoriigi iliajn riĉan sperton kaj tradiciajn teknikojn, tiel ke la arto



Asistanta ĉefinĝeniero Yang Yingxiu (la dua de maldekstre) diskutas brodarton kun siaj kolegoj.

ĉiam pli noviĝis kaj eniris en novan etapon de sia disvolviĝo.

En la fabriko mi vidis, ke ĉiuj brodistoj estas absorbitaj en sia laboro. La brodistino, kiu laboris super portreto de japana virino en kimono, min sciigis, ke ŝia brodaĵo estas unu el la ses portretoj menditaj de japana kliento, kiu faris sian mendon pro la famo, ke Ronald W. Reagan, la prezidanto de Usono, ŝatas la portreton broditan en Hunan-provinco. Antaŭ ol R. Reagan enoficiĝis kiel prezidanto, onidire, lia amiko deziris fari al li donacon kaj petis lian opinion. R. Reagan esprimis sian preferon pri portreto brodita en Hunan-provinco, Ĉinio. Tiu

amiko do tuj sendis mendi broditan portreton de R. Reagan ĉe la Brodaĵo-fabriko de Hunan-provinco.

En la instituto mi konatiĝis kun teknikistino Zhou Jinxiu, kiu estis brodanta ekranon, kies unu flanko prezentas leonon kaj la alia tigron. Ŝi klarigis al mi, ke por zorgeme plenumi tian verkon oni devas antaŭe bone studi la pentraĵojn, kiuj servas kiel modelo, elekti konvenajn kudromanierojn kaj brodi pli ol 300 labortagojn.

La ambaŭflanka brodado kun malsamaj desegnoj kaj malsamaj koloroj baziĝas sur la simpla unuflanka brodado kaj estas la rezulto de disvolvo de la am-



Teknikistino Zhou Jinxiu instruas junajn brodistinojn.

baŭflanka brodado kun samaj desegnoj kaj samaj koloroj kaj tiu kun samaj desegnoj kaj malsamaj koloroj. La unuflanka brodaĵo, kiel oni scias, havas nur aprec-valoron de unu flanko, kaj sur ĝia dorsa flanko videblas nenio alia ol senordaj kudreroj kaj faden-finoj. Ambaŭflankan brodaĵon kun samaj desegnoj kaj samaj koloroj oni povas apreci de ambaŭ flankoj. En tiaj okazoj brodistoj devas malaperigi la sennombrajn kudrerojn kaj faden-finojn per kompleksa teknologia traktado. Pli malfacile estas fari ambaŭflankan brodaĵon kun samaj desegnoj kaj malsamaj koloroj, ekz.,

la brodaĵon “Katidoj”, sur kies fronta kaj dorsa flankoj prezentigas du katidoj tute samaj en la aspekto kaj teniĝo, sed malsamaj en la har-koloroj: unu — orkolora, la alia — jade blanka. La malfacileco kulminas ĉe la farado de la brodaĵo. Konservante siajn tradiciajn trajtojn de bonordeco, glateco, maldikeco kaj brilriĉeco, la Hunan-a brodaĵo prezentas ambaŭflanke du desegnojn, kiuj draste diferencas inter si per bild-komponado, figurado, koloroj kaj kudromanieroj. Ekz., ĉe la sama parto de la brodaĵo “Belulino en Buduaro”, unuflanke vidiĝas nigra hararo de la belulino, sed ali-

flanke helkoloraj vangoj; kaj en la brodaĵo “Leono kaj Tigro”, oni aplikas tute malsamajn kudromanierojn por prezenti la rekte kaj forte starantajn harojn de la tigo sur unu flanko kaj la longajn kaj molajn kolharojn de la leono sur la alia; kaj krome, diafanaj estas la teksaĵoj uzataj kiel la fonoj de tiuj brodaĵoj; ĉio ĉi postulas ke la brodistoj havu perfektan teknikan lertecon kaj anticipe faru bonan pripensadon pri la kudromanieroj kaj koloroj uzotaj por la desegnoj sur ambaŭ flankoj. Iu ajn miskudrero povus fiaskigi la tutan brodaĵon. La teknika malfacileco kaj la valoro de tiaj artaĵoj estas senprecedencaj en la historio de la brodado.

En februaro 1980 estis kreita la unua Hunan-a ambaŭflanka brodaĵo kun malsamaj desegnoj kaj malsamaj koloroj — la ronda ekrano “Kato kaj Hundo”, sur kies unu flanko oni vidas la kapon de griza kato, kiu stulte sed aminde premas al si la lipojn, dum la desegno sur la alia flanko vivece prezentas la kapon de flava longhara hundo, kiu petole elŝovas la langon. La brodaĵo vekis grandan sensacion tuj post sia ekapero; multe da fremdlandaj amikoj tre admiris kaj deziris ĝin aĉeti. Fine, iu kliento el Britio fariĝis la mastro de tiu valora artaĵo.



Fluso de Qiantang-rivero

Fotoj de FANG BINGHUA kaj WU YUANLIU



Fluso en matenruĝo


La muĝanta tajdo





Rigardantoj de fluso





Atendantoj

Rigardado al fluso

La fluso de la rivero Qiantang en Zhejiang-provinco, Ĉinio, estas fame konata miraklo. La 18-a de la oka monato laŭ la luna kalendaro estas tago por rigardi la fluson. Kiam la fluso ankoraŭ ne venas, la rivero kviete fluas orienten. Sed kiam la fluso aperas ĉe la riverbuŝo, ĝi prezentiĝas kiel mallarĝa blanka strio sur la akvo, kaj iom poste kiel blanka rubando, kiu horizontale kuŝas sur la rivero kaj sin movas malrapide. Kiam la fluso alproksimiĝas, oni subite ekvidas muĝantan tajdon, kiu frapas la bordojn. La levita tajdo kelkiam eĉ havas la altecon de 4-5 metroj.

Fluso estas natura fenomeno kaŭzita de la gravito de la luno. En la 18-a de la oka monato laŭ la luna kalendaro la suno, tero kaj luno estas sur la sama linio kaj tiam la gravito de la luno estas plej granda kaj tiel la tajdo plej alta. Krome, Hangzhou-golfo, en kiun fluas Qiantang-rivero, havas formon de klariono kun granda buŝo kaj maldika kolo, tial kiam alkuras tajdo, estiĝas mirinda spektaklo.




此畫中未重法隨姚君魏紫同新板脂筆出
溪龍茶齋畫師第二春信若人更在宮中書少



百鳥朝鳳
丁巳年
楊文彬

Floroj (murekrano)

Belulino en Buduaro (ronda ekrano)





Birdoj Omaĝas al Fenikso. (murekrano)

Hunan-aj brodaĵoj

Fotoj de YAN ZHENGUO



Longhara Hundeto (ronda ekrano)





300

La 300-ª numero de EPC

世界语《中国报道》一九八三年第九期（本刊代号：二——九一五）北京市期刊登记证第692号

